# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 1

Nr 1

IPR

LVP

Oktobro 1970 Nürnberg N-ro 1

# ENHAVO


Paĝo

O Sciigoj de la redaktoro 3

Forpasis Rudolf Rákuŝa 4

A **Ĝeneralaj artikoloj**

La Lingvo Internacia en la establita mondo (Rákuŝa) 5

Ne oftaj jubileoj (Novobilsky) 8

B **Metodikaj kaj didaktikaj traktaĵoj**

La Memlernado teorie kaj praktike (Wojciechowsky) 9

La instruado de Esperanto (Sonnabend) 13

C **Informoj el la pedagogia vivo**

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj 16

Konkludoj kaj Decidoj de la Internacia Instruista Konferenco de ILEI, Maribor 17

Protokolo de la intervjuo kun la reprezentantoj de la sindikatoj kaj de la komunista partio de Slovenio 18

Regularo de la Internacia Ekzameno por Instruistoj membriĝintaj en ILEI 20

Instruado de Esperanto en la fakultato de Beletroj en Clermont Ferrand (Janton) 22

Esperanto programita 23

Ĉ **Opinio — propono — deziro — sciigo**

Esperanto-elsendoj de POLA RADIO 23

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV) 23

Bibliografiaj informoj 24

Albrecht Dürer kaj Esperanto 24

Pri eduka influo de turismo 24

12a Internacia Infana Kongreseto 25

D **Dokumentoj, laŭ kiuj Esperanto estas instruata en la lernejoj**

La programoj de Filologia Fakultato — Fako Esperanto Lingvo Kaj Literaturo Enkonduko en la Studadon de Esperanto 25

# O Sciigoj de la redaktoro



## 1. Generale

Post longa prokrasto denove aperas IPR. Iu sinjoro el Pollando skribis al mi: Grave por IPR estu la regula aperado. Tio estas vera vorto. Sed, kiu eldonisto riskus duan eldonon, se sur la abonlisto staras nur 189 abonantoj? Unuanima estas la opinio de la plimulto de la ILEI-anoj: Ni bezonas Pedagogian Revuon. Tamen, la eldonisto bezonas abonantojn kaj la redaktoro artikolojn. Dum la voko al IPR estis (estas) abunda, estis ĝis nun la fluo de abonantoj kaj artikoloj malabunda.

Por la redaktoro la plej grava evento de la ILEI-konferenco en Maribor estis la unuanimaj decidoj de la laborkomisiono, estraro, komitato (en Vieno) kaj asembleo, ke la abono de IPR estu deviga, t. e. la revuo nun apartenas al la membreco. Pri detalaĵoj legu en ĉi kajero la decidojn de la ILEI-konferenco.

La rezulto de ĉi tiuj decidoj estas la nova numero de IPR!

## 2. Pri la enhavo

Kiam ni staris ĉe tombo de prof. Rakuŝa — li estis enterigita en majo 1970 sur la tombejo de Maribor — ni pensis al la pedagogia semajno en Sonnenberg (1968), kie prof. Rakuŝa partoprenis kaj prelegis pri „La Lingvo Internacia en la establita mondo". Tio estis lia lasta renkontiĝo en internacia rondo ekster Jugoslavio. Kelkajn monatojn antaŭ sia morto li reprilaboris la prelegon kiel artikolon por IPR.

Esperante, ke la estimataj gekolegoj aprobos la artikolon „Ne oftaj jubileoj ...", mi volonte prezentas ĝin, ĉar mi pensis al tiuj preskaŭ blindaj infanoj lernantaj Esperanton en speciala lernejo en Hannover (GFR).

Esenca vidpunkto de la hodiaŭa pedagogio estas, ke instruado ne plu havas memutilon, sed ĝi celas veki en la lernanto la kapablon per memlernado alproprigi la necesan scipovon. Apud teoriaj konsideroj prof. Wojciechowki aplikas en sia artikolo praktikajn konkludojn.

Vasta diskutado estas necesa pri la instruado de Esperanto. Jen estas la unua instiga kontribuaĵo.

Larĝan spacon pretendas la informoj. Por ke ĉiu membro kaj abonanto konu la estraron kaj sekciestrojn de ILEI, ni prezentas koncernan liston. Kvankam ankaŭ laŭ nombro la ILEI-konferenco estis kontentiga, tamen la plimulto de niaj membroj ne partoprenis. Estas mia konvinko, ke laŭ nia membroforto tutfacile povus partopreni pli ol 1 000 instruistoj. En ĉi tiu mondo nur grandaj nombroj konvinkas. Nun la konkludoj kaj decidoj donu malgrandan superrigardon pri la farita laboro. El la multaj protokoloj estu prezentata tiu, kiu raportas pri la kunveno kun la reprezentantoj de la sindikatoj kaj la komunista partio. Efektive la intereso al Esperanto en ĉi tiu lando estas granda!

Grava paŝo antaŭen estas interalie la ekzamenordo de ILEI, ĉar en multaj landoj ne ekzistas la ebleco fari ŝtatan ekzamenon. Grave estas nun, ke la landaj sekcioj baldaŭ fondu landajn ekzamenkomisionojn. Pliaj detalaĵoj sekvos en la venonta numero de IPR.

Nova estas en nia revuo la rubriko pri oficialaj ŝtataj dokumentoj. Jen ni intencas laŭbezone komuniki tiujn dokumentojn, laŭ kiuj oni instruas Esperanton oficiale kaj devige en diversaj ŝtatoj. Tiuj dokumentoj servu ankaŭ kiel ekzemplo por tiuj ŝtatoj, kie oni ankoraŭ ne atingis la oficialecon, samtempe ili kontribuu al la unuecigo de diverslandaj planoj kaj aspiroj.

La vicon ni komencas per la publikigo de la detala programo de Esperanto-fako enkondukita oficiale en la Universitaton Eötvös Lóránd, Budapest (Hungario), definitivigita en 1969/70. Ĝin kaj la projekton ellaboris d-ro István Szerdahelyi, la fakestro de la instruista fako „Esperanto lingvo kaj literaturo" kaj estis akceptita fare de la Dekano de la Filologia Fakultato de Scienca Universitato Eötvös Lóránd, Budapest.

**Forpasis Rudolf Rákuŝa**

La 25an de majo 1970 post mallongdaŭra malsano mortis prof. Rudolf Rákuŝa en Ljubljana.

Li naskiĝis la 22an de marto 1893 en la vilaĝo Tomaz apud Ormoz en nordorienta parto de Slovenio. Post finitaj studoj li aktivis kiel profesoro en komerca akademio, en ekonomia mezlernejo, en administra mezlernejo kaj fine en Pedagogia Akademio en Maribor. Esperanton li lernis en 1922 kaj diplomiĝis ankaŭ kiel Esperanto-instruisto antaŭ la ŝtata ekzamenkomisiono en Vieno 1925.

En la jaro 1926 li organizis kaj prezidis la 3-an jugoslavian Esperanto-kongreson en Maribor. Kiel afergvidanta vicprezidanto li gvidis la Jugoslavian Esperanto-Ligon de la jaro 1927 ĝis 1929. Pro meritoj li estis elektita honora membro de Esperanto societo Maribor kaj prezidanto de honora komitato.

Plejparte li aktivis kiel verkisto, preleganto kaj tradukanto. En la jaro 1937 li verkis sian unuan lernolibron „Esperanto". Post la dua mondmilito li verkis novan en du partoj. De tiu aperis poste ankoraŭ la II-a kaj III-a eldono, ĉiam iom ŝanĝita kaj plilarĝigita de ŝtata eldonejo de SR Slovenio.

Dume li skribis multajn artikolojn pri Esperanto en enlandaj naciaj gazetoj kaj en pli gravaj Esperanto-revuoj. En 1957 aperis lia unua eldono de „Metodiko pri Esperanto-instruado", ĝia dua eldono en la libro „Esperanto kaj lernejo" en 1959. Nun estas en presejo multe pliamleksigita eldono de „Metodiko pri Esperanto-instruado" (eldono UEA kaj Mladinska knjiga en Ljubljana).

La partoprenintoj de diversaj kongresoj, internaciaj pedagogiaj seminarioj kaj lernejaj konferencoj rememoras certe lin kiel humanece kaj science profundan preleganton kaj spritan diskutanton.

Aktiva estis lia kunlaboro en la Lingva Komitato kaj en la Akademio de Esperanto, kies membro li estis.

Lia kreado estis multflanka, ĉar li same verve kaj aktive kreadis kiel sciencisto ankaŭ sur kampoj de stenografio, grafologio kaj maŝinskribado. Li verkadis lernolibrojn el tiuj sciencaj fakoj ne nur por Slovenoj sed ankaŭ por la tuta Jugoslavio. Lia granda merito estas la unuecigo de multnombraj stenografi-sistemoj de kroata kaj serba naciaj regionoj kaj fine verko de komuna stenografia lernolibro por tiuj du lingvaj regionoj de Jugoslavio.

Neanstataŭebla li restos por gekolegoj, studentoj kaj ni esperantistoj, kiel mentoro kaj gvidanto, neniam forgesebla kiel ege modesta, ĉiam bonhumora, klera, kulturita kaj de ĉiuj ŝatata homo kaj sincera amiko.

Ludoviko Prebil

**Rudolf Rákuŝa**

# La Lingvo Internacia en la establita mondo*)

En nacilingvaj artikoloj oni trovas nun ofte la anglan esprimon „establishment" (elp. istébliŝment). La vorto havas la saman signifon kiel la franca „établissement" aŭ la esperanta substantivo „establ(aĵ)o", derivita el la oficiala verba radiko „establi". La signifo estas: daŭre funkcianta organizo. Oportuna estas la esprimo „establita mondo". Ĝi karakterizas mondon aŭ ordon, en kiu ĉiu organizo kaj ĉiuj institucioj funkcias kaj daŭras, en kiu ekzistas reganta sistemo de politikaj kaj ekonomiaj formoj kaj ideoj.

Kontraŭ ĉi tiu establita mondo ribelas nun en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo la tiel nomata „kolera" junularo, precipe en la universitatoj. Por ni esperantistoj tiu fenomeno estas tre interesa, ĉar la Esperanto-movado certagrade ankaŭ batalas kontraŭ la establita ordo kun la lingva superregado flanke de kelkaj mondlingvoj. Ĝis nun la penadoj de la esperantistaro restis en la kadro de modestaj argumentoj kaj sugestoj. Ni estis konvinkitaj, ke la vereco kaj utileco de niaj rezonoj rezultos la venkon de la ideo, alivorte, ke la reprezentantoj de la establitaj mondlingvoj cedos al niaj prudentaj argumentoj.

Kiaj estas la ĝisnunaj tiurilataj spertoj? Pro la lingva imperialismo Esperanto vane atendas subtenon de oficiala Anglujo, kvankam ĝi estas la patrolando de parlamentismo, de Usono, kvankam ĝi asertas esti lando de libereco kaj progreso, kaj de Soveta Unio, kvankam ĝi estas la centro de la socialismo. La politikaj reprezentantoj de mondlingvoj ĝis nun ĝenerale malatentis aŭ eĉ ignoris la disvastigon de Esperanto. Sed se nia movado komencus decide konkuri kun la mondlingvoj, tiam ili certe mobilizus siajn fortojn por montri, kiu estas pli potenca. Ĉi tiu konstato estas amara, sed ankaŭ por ni esperantistoj valoras la sperto, ke estas kontraŭ niaj interesoj malrekoni neagrablajn faktojn. Inter la regantaj mondlingvoj okazas pro prestiĝo sendube akraj, postkulisaj bataloj.

Okazas ankaŭ ŝanĝoj en la vicordo de ilia potenco, tamen la sola penso, ke en tiun establitan lingvan sistemon povus enpenetri tute nova, eble por ĉiuj danĝera membro, la Lingvo Internacia, estas por ili tute neimagebla. Ni devas la esperantan propagandon akordigi kun tiuj realaĵoj kaj aldoni al la ĝisnunaj rimedoj ankoraŭ novajn, pli modernajn kaj eble pli efikajn.

La esperantistoj certe ne volas detronigi la mondlingvojn. Kontraŭe, ĉiu lernanto de Esperanto ricevas kun sia scio gravan kapitalon por sukcese lerni ankoraŭ iun fremdan lingvon. Tamen ni estas revoluciaj en la senco, ke ni volas transformi la establitan lingvan sistemon. Tiurilate ni marŝas paralele kun la ribelanta junularo, kiu sentas sin katenita en la kadro de la reganta sistemo, kaj kun la progresemaj intelektuloj, kiuj tamen ĝuste rilate la lingvan diskriminacion montras grandan nedecidemon. Ili ja konsideras la multlingvecon neoportuna, sed en la praktika vivo ili lasas sin kateni per la reguloj de la establita lingva sistemo.

Por la esperantistaro estas interesa la unua grupo, do la junularo, ĉar ĝi formos la morgaŭan mondon, spite de tio, ke ĝi nun en la tuta mondo kaŭzas idean kaj socian maltrankvilon. Estas malfacile en ĉi tiu fenomeno diferencigi la revolucian kernon ekde la fanfarona frazaro kaj nereala ekstremismo. Utile estas koni la devenon de tiuj revoluciaj ideoj.

Post la dua mondmilito aperis en la maldekstraj partioj serio da malfidelaj grupoj, postulantaj novajn ideojn, ĉar la ĝisnunaj ne kontentigis ilin. La juna generacio kun simpatio akceptis tiun agadon kaj fervore studis la novajn teoriojn: la ekzistencialismon de Sartre, la humanan marksismon, la modernigitan kristanismon kaj antaŭ ĉio la ideojn de Herbert Marcuse.

Marcuse kritikis post sia reveno el Usono ne nur la kapitalismon sed ankaŭ la sovetan socialismon. Tion li faris surbaze de valoraĵoj, kiuj devus esti ankoraŭ starigitaj. Laŭ Marcuse la portantoj de la nova ideologio estas precipe la studentoj kaj la humanistaj intelektuloj, kiuj la propran ekzistadon ne ligas kun la destino de la socio, en kiu ili

---

*) De la aŭtoro mallongigita prelego dum la Sonnenberg-konferenco (20—29 sep 1968), kiun partoprenis 78 personoj, inter ili ĉ. 50 instruistoj el 14 landoj.

vivas. Ili kontraŭbatalas ĉion, kio estas organizita, instituci̧a. Ĉar kio estas avangarda, estas ekster la institucioj. Kio estas organizita, kio apartenas al la establita mondo, tio sklavigas la animon de la revolucio.

En la ideoj de Marcuse trovis la junularo la diagnozon de la situacio, la modelon de la progresema 20-a jarcento. Por siaj ideoj la junularo estas preta riski ĉion, ankaŭ batalon, liberon, eĉ la vivon. Sendube la maldekstra ideologio havas tiun pozitivan econ, ke ĝi enportas intelektualan kaj moralan maltrankvilon en la ekzistantajn sociajn strukturojn. Ĉie okazas fundamentaj kaj gravaj sociaj ŝanĝoj, en kiuj eĉ la plej ekstremaj kaj nematuriĝintaj ideoj trovas fekundan terenon. Ankaŭ en la socialismaj landoj forta grupo da intelektuloj, precipe da verkistoj, kontraŭas la burokratismon en la ŝtata aparato, la katenigon de la libereco kaj la neoportunan ekonomian kaj socian politikon. Aliflanke la hodiaŭa industriigita mondo estas pro sia establita strukturo ofte malfavora al la juna generacio. Certe oni konsideras la junularon kiel socian faktoron kaj konsumanton, sed ne donas al ĝi la eblecon tuj decide partopreni la evoluon kaj laŭ propraj ideoj modifi la socion.

Kontraŭ la establita mondo batalas ankaŭ la „kritikaj", „liberaj", „eksperimentaj" universitatoj. Apartan rolon ludas la tielnomataj „kontraŭuniversitatoj". La programo estas revolucia. En Usono ĝi ekz. tekstas: „La Libera Universitato de New York estis fondita kiel respondo al la intelekta bankroto kaj la spirita mizero de la amerika establita eduksistemo, kiu estas korupta kaj malebligas iun ajn emancipadon de la homo." La Londona Kontraŭuniversitato: „Ni batalas kontraŭ la malaktiveco kaj senhumanigo de la vivo en la okcidento." La postuloj de la Kritika Universitato en Berlin estas antaŭ ĉio la scienca analizo de la politikaj celoj kaj agadoj de la demokrata opozicio inter la studentaro. Aliaj universitatoj havas seminariojn pri Vjetnamio, pri la batalo kontraŭ la malsato kaj mizero, pri la rasaj bataloj en Usono, pri Ĉinio, pri la minoritatoj ktp.

Vane oni serĉas inter la abunda programo vorton pri la diskriminacio de malgrandaj lingvoj, do pri la problemo de la Lingvo Internacia. Tio estas por la esperantistoj des pli surpriziga, ĉar la fundamenta tasko de la kontraŭuniversitatoj estas akcepti ĉion novan, kio estas realigebla. Se ili aktivas en la formado de kontraŭlernejoj kaj kontraŭkomercejoj, ili devus pridiskuti ankaŭ la temon de kontraŭmondlingvoj, el kio sekvus la akcepto de Esperanto, do iu revolucia ŝanĝo en la interhomaj rilatoj.

Estas interese, ke la ribelanta junularo seniluziiĝis pri la laborista klaso, ĉar la lasta ne montris tian revoluciemon, kiun oni atendis. La maldekstra radikalismo asertas pro tio iom troigite, ke la potenco de la laborista klaso estas mito. Forĵetante unu miton, la junularo serĉas novan, same nepruvitan. Neigante la potencon de la laborista klaso, la junaj radikaloj tamen serĉas apogon en ĉi tiu tavolo, opiniante, ke ili povas same utile manipuli la laboristaron, kiel tion faras la partia burokratismo.

Ĉi tie altrudiĝas interesa komparo kun la spertoj, akiritaj pri la laboristaro en la esperantista movado. Konata estas la eldiro de Zamenhof pri la decida graveco de la laborista klaso por Esperanto. Sekve SAT devus esti giganta kolektejo de laborantaj amasoj, batalantaj por la ideo de la Lingvo Internacia. Jes, simpatioj ekzistas, en kelkaj landoj ankaŭ sukcesoj, sed ĝenerale oni devas konstati, ke la laboristaro estas firma parto de la establita mondo kaj mem ne trovas la forton, efike kontraŭi la regantan lingvan sistemon, kiu sekvigas la lingvan diskriminacion.

Tiu fakto valoras por la okcidento kaj oriento. Ke siatempe de Gaulle rifuzis la ideon de la Lingvo Internacia — pikanta ironio estas, ke li menciis nur volapük — ne estas mirige, ĉar li pensis antaŭ ĉio al la gvidanta rolo de la franca lingvo, kvankam ĝuste Esperanto estas la rimedo malebligi, por ke la grava kultura funkcio de ĉi tiu lingvo ne perdiĝu inter la pli grandaj lingvaj konkurantoj. Nin konsolu la eldiro de Montagne: „Ĉiu parolas foje sensencaĵojn; la malfeliĉo estas, ke iuj elparolas ilin solene." Sed ĉi tiu konsolo ne povas vuali la seniluziiĝon de la esperantistoj, ke la franca laboristaro en la tuteco ne reagis, ĉar en la establita mondo apartenas ilia lingvo al la mondlingvoj.

Similan situacion oni havas en la Soveta Unio. La rusa lingvo regas, la malgrandaj nacioj vole-nevole akceptas ĝin apud la propra, la aliaj mondlingvoj rekonas ĝian potencon kaj valoron. Tiurilate ne ekzistas diferenco inter la kapitalismo kaj soveta socialismo. La sola forto, kiu gvidas la amasojn, estas la sopiro pri bonstato. Se en la oriento

la ŝtato kontrolas la unuopulojn, en la okcidento la amasoj estas manipulataj pere de televido kaj ilustritaj gazetoj. Ne sammaniere, tamen ĉie la libereco estas endanĝerigita en tiu senco, ke la unuopulo ne konscias, ke li agas ne libere, sed en la tendenco de la establitaj institucioj.

Ni batalantoj por Esperanto luktas kontraŭ la ekzistanta lingva ordo en la establita mondo. Kompreneble al nia pacemo kaj temperamento ne decas grimpi sur la barikadojn. Tamen ni konfesu, ke sen pli decidaj agoj ni restos la eta lingva minoritato sen ŝancoj esence ŝanĝi la lingvan ordon. La Zamenhofa metaforo pri „guto malgranda, konstante frapanta traboras la monton granitan" certe valoras kaj la sistema, larĝvida agado de UEA donis jam rimarkindajn sukcesojn. Estus do malsaĝe malhelpi ĉi tiujn kaj similajn paralelajn penadojn. Kontraŭe, oni devas ilin subteni per ĉiuj fortoj. Tamen tio ne signifas, ke analizo de la nuntempa situacio ne utilas kaj ke la sociaj fluoj kaj la junaj fortoj, kiuj atakas la establitan mondon — do la establitajn instituciojn, kiuj pro sia inerteco kontraŭas la ideon de la Lingvo Internacia — ne estus utiligeblaj por niaj celoj.

En la demokratio kreskas la aŭtoritato de malsupre supren. La prezidanto de Jugoslavio, marŝalo Tito, do pravas dirante, ke oni devus enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn, sed ne per iu dekreto de supre, sed per la premo de la informita publika opinio de malsupre laŭ vera demokratia maniero. Estiĝas la demando, ĉu estas eble la amasojn de almenaŭ kelkaj nacioj informadi pri Esperanto tiel detale kaj profunde, ke la efiko rezultigus la enkondukon de Esperanto en ĉiujn lernejojn? UEA kaj la landaj esperantistaj organizaĵoj ja substrekas ĉiam denove la gravecon de informado, kelkaj nacilingvaj gazetoj donas al ni larĝanime iom da spaco, sed kompare kun la abundeco de la hodiaŭaj amaskomunikiloj, kiuj tage kaj nokte superŝutas la publikon kaj formas ĝian opinion, nia propagando nur por momento atentigas la amasojn pri la problemo, sed ne kaŭzas la situacion, el kiu naskiĝas revolucia ago aŭ almenaŭ forta premo.

Tio estas faktoj, konstateblaj el vidpunkto de objektiva observanto. Kvankam ni esperantistoj donas al la homaro idealan, facilan kaj neŭtralan ilon de interkompreniĝo kaj uzas kontraŭ la mondlingvoj konvinkigajn, honestajn kaj sincerajn argumentojn, tamen tio ne estas egalrajtaj konkurantoj aŭ eĉ helpantoj, sed tio estas lukto de malgrandulo kontraŭ giganto. Niaj argumentoj frakasiĝas antaŭ la alta muro de la establitaj mondlingvoj. Se temas en oficialaj rondoj pri la Lingvo Internacia, oni kutime ne estas rekte kontraŭ, sed nur zorgas, ke iu decido ne estu farita, ĉar oni ne toleras ŝanĝon de la reganta sistemo. La establitaj institucioj, al kiuj apartenas ankaŭ la Unuiĝintaj Nacioj, ne deziras esti ĝenataj de revoluciaj ideoj, ekz. de la Lingvo Internacia, kiu volas — laŭ ilia opinio — nur detrui la establitan sistemon de la regantaj mondlingvoj. Oni konfesas, ke la nuna sistemo estas nepraktika, multekosta kaj naskas ĉiam novajn aspirantojn por enviciĝi en la kategorion de la superuloj, sed akcepti Esperanton estus tiel revolucia ago, ke la sola penso povus ŝoki la defendantojn de la nun apenaŭ funkcianta sistemo.

Ke la kontenteco pri la nuna stato de la Esperanto-movado ne gvidu al rigidiĝo, ni devas ĉie serĉi kontaktojn kun la ribelanta junularo. Pro tio oni ne devas havi zorgojn pri la reputacio de nia movado. Por esti preparita por la estonta batalo inter la establita mondo kaj la Lingvo Internacia ni bezonas la tutan junularon, la paceman kaj la ribelantan. Ne ekzistas ĝustadire unueca generacio, sed diversaj tavoloj. La anoj de unu tavolo similas laŭ siaj ideoj kaj laŭ la konduto pli al siaj gepatroj ol al la samaĝuloj de la alia tavolo. Pro tio ankaŭ la diversa rezonado. La maldekstra tavolo asertas, ke ĝi alportas revolucian progreson. La alia tavolo samopinias kun la gepatroj, dirante: „Via revoluciemo estas tro radikala kaj nepripensita. Vi detruas, kio estis penege konstruita."

Ĉar la Esperanto-movado estas samtempe pacema kaj revolucia, ĝi laboru kun ambaŭ tavoloj. Grava tasko de TEJO estas trovi kontaktojn ankaŭ al la ribelanta junularo kaj konvinki ĝin, ke valoras batali por niaj celoj, kiuj estas same kiel la iliaj direktitaj kontraŭ la establitaj institucioj.

La laŭprograma laboro de UEA devas kompreneble iri seninterompe antaŭen, interalie la propagando inter la instruistaro. Kiam la junularo amase akceptos la gvidideon, ke

la venko de Esperanto dependas de venko kontraŭ la establitaj institucioj, kaj kiam en multaj landoj nia movado baziĝos en la lernejoj sur la ŝultroj de konsciencaj instruistoj-esperantistoj, tiam ni povos esperplene atendi la venkon. Nin helpos unuflanke la fajro de la junularo, aliflanke la serioza kaj fidinda stabileco de lingvaj kaj metodikaj fakuloj, kiuj pro sia profesio aŭtomate zorgos, ke Esperanto ne nur daŭre disvastiĝu, sed ke ĝi vere fariĝu „la latino de la demokratio".

## Ne oftaj jubileoj . . .

Antaŭ mi kuŝas dikfolia kajero kun reliefpunkta skribo. Ŝajne senorda punktaro transformiĝas sub sentemaj kaj trejnitaj fingroj de blinduloj-esperantistoj al vortoj, pensoj, informoj — al vera fenestro en la esperantistan vivon. La sekvantajn liniojn mi volas dediĉi al tiu ĉi brajle presata revuo, ĉar ĝi efektive meritas nian atenton. Ĝia simbole sonanta nomo estas „Aŭroro", ĝia naskiĝlando - Ĉeĥoslovakio.

Se iu Esperanta gazeto vivas dek jarojn — ni aplaŭdas ĝin. Se la vivo-daŭro de ĝi esprimiĝas per kvindeko, ni nur mire enpensiĝas. Kaj vere tia mirige eksterordinara afero okazis en la esperantista mondo, ĉar la „Aŭroro" atingis en la jaro 1970 sian kvindekjaran regulan aperadon kaj fariĝas tiel verŝajne la plej malnova Esperanta gazeto nun aperanta.

Ĉe la lulilo de la „Aŭroro" staris la fama blinda muzikkomponisto Karel Emanuel Macan, la tiama muzikpedagogo de la Blindulinstituto de Klár en Praha. Jam en la jaro 1904 li konatiĝis kun klopodoj de la juna sveda blindulo Harald Thilander, franca fraŭlino d' Her kaj la pariza profesoro Theophile Cart, pri utiligo de Esperanto por blinduloj. Precipe la reliefe presata revuo „Esperanta Ligilo", kiun fondis prof. Cart en 1904, forte impresis en la blindula medio kaj elvokis ĝeneralan intereson pri Esperanto. Oni komencis presigi lernolibrojn, vortarojn kaj alian stud-materialon por blinduloj. En pluraj urboj estis malfermitaj kursoj de Esperanto por blinduloj. Simila situacio regis ankaŭ en la ĉeĥaj landoj kaj la sukcesa instruado de Esperanto al blinduloj motivis fondon de „Aŭroro". Komence ĝi aperadis kiel aldono al la ĉeĥa blindulgazeto „Zora"; en 1924 ĝi fariĝis memstara gazeto.

Post morto de Majstro Macan (1925) transprenis la redaktorecon profesoro Stanislav Stejskal kaj plenumis ĝin ĝis sia morto en 1929. Poste anstataŭis lin s-ano Vuk Echtner, kiu sub kondicoj favoraj kaj malfavoraj persiste redaktas la revuon ĝis nun. Pli ol kvardekjara redakta laboro! Jen dua eksterordinara jubileo, kiun festas homo ekstreme oferema por la aferoj Esperanta kaj blindula.

Interesan bildon prezentas komparo de ampleks-kresko de la revuo: komence aperadis 40 paĝoj da Esperanta teksto jare. En pli postaj jaroj la amplekso altiĝis al 80 paĝoj. Post la dua mondmilito fariĝis „Aŭroro" denove aldono de la ĉeĥlingva blindulorgano Zora, sed ĝia amplekso fariĝis 40 paĝoj en ĉiu de ses ĉiujare aperantaj numeroj. En la jubilea jaro decidis la redakcio de Zora eldoni reprezentan literaturaĵon tradukitan el la ĉeĥa kaj dissendi ĝin donace al siaj 450 legantoj en eksterlando.

Legantoj de la „Aŭroro", krom en Ĉeĥoslovakio, troviĝas en 38 landoj; pro malfacilaĵoj koncerne akceptadon de translimaj abonpagoj la ĉeĥoslovakaj blinduloj pagas mem la abonon por siaj eksterlandaj samsortanoj.

Ĉi tiun artikolon, kiu celis memorigi la Esperantan publikon pri la eksterordinaraj jubileoj de la blindul-revuo „Aŭroro" kaj ties redaktoro s-ano Vuk Echtner, mi volas fini per trafaj vortoj de profesoro Macan:

„La reliefpunkta skribistemo de Braille kaj la internacia helplingvo Esperanto — jen du donacoj plej valoraj el ĉiuj donitaj iam ajn al la blindularo. La unua ebligis instrui blindulojn, la alia malfermis vojon al la mensoj kaj koroj de blinduloj tra la tuta mondo."

D-ro V. Novobilsky

**Prof. D-ro Kazimierz Wojciechowsky**

— la gvidanto de la Instituto Andragogia en Varsovia Universitato, la ĉefredaktoro de la scienca revuo „La Klerigo de Plenaĝuloj", la konata pedagogo kaj sociaganto.

# LA MEMLERNADO TEORIE KAJ PRAKTIKE

Kiel ni vidas memlernadon en la homa vivo kaj kleriga sistemo? Kio estas la memlernado? Kiel preparita por la memlernado devus esti la diplomito de lernejo aŭ kurso? — jen la demandoj gravaj, kiuj aperas antaŭ klerigistoj, kaj je kiuj ni, almenaŭ parte, klopodos respondi.

## Iom da historio

La memlernado estas fenomeno historia. Ĝi manifestiĝis pli amplekse en turnopunkto de la jarcentoj XVIII kaj XIX. Depost la tempo ĝi ĉiam evoluas. La kulturo de diversaj socigrupoj multon dankas al ĝi. La memlernadon aplikis instruistoj, metiistoj kaj terkulturistoj, la membroj de politikaj partioj, la arestitoj, eĉ la grandaj sciencistoj, inventistoj, artistoj kaj agantoj. Memlernuloj estis J. J. Rousseau (eĉ unu tagon li ne pasigis en lernejo), Faraday, la fama M-me Sans Gêne (lavistino), R. Owen, M. Gorkij, M. Nexö. Per la memlernado atingis la grandan intelekton la famaj verkistoj Orzeszkowa kaj Prus ....

Per la memlernado iris ekde laboristo ĝis inĝeniero S. Sołdek. La granda plejparto de nuntempaj politikistoj svedaj spertis la bonon de la memlernaj rondoj. Al ili dankis multon ankaŭ, J. S. Mill — la eminenta angla filozofo kaj logikisto, kion li ja konfirmas en sia biografio.

Ankaŭ nuntempe okazas la mema klerigado de intelekto, de scipovo kaj de karaktero kaj ĝi eĉ estas pli ampleksa kaj pli riĉa en formoj. En la nuntempo oni observas la penon akiri mem la novan scion kaj scipovon inter la alte specialiĝintaj homoj per la diversforma memlernado.

## La memlernado dum tuta vivo

En malnova tempo la vivo de la bonstataj homoj dividiĝis je tri periodoj: de la ludado, de la lernado kaj de la laborado. La homo lernis nur junaĝe. Poste la sociologio de edukado nomis tri ĉefajn procezojn influantajn la evoluon de la homo: la faktoj de la spontana evoluo, la klerigado fare de instruistoj kaj la memlernado. Se ni kunstarigus la dividojn, ni ricevus jenan bildon: dum la infanaĝo dank' al aktiveco en propra medio la homo evoluas spontane, dum junaĝo li aŭ ŝi troviĝas en lernejo, dum la profesia laboro li aplikas la memlernadon. Skeme oni povas prezenti tion jene:

| La periodo de | La faktoroj klerigaj |
|---|---|
| ludado | la medio |
| lernado | la lernejo |
| laborado | la memlernado |

Preterigante la malavantaĝojn de tia skema pritrakto kaj se ni eĉ aldonus, ke temas pri la influo de la medio kaj de la lernejo, hodiaŭ ni ne povus konsenti je tio, ke la memlernado aperas nur en la periodo de la profesia laboro. La esploroj de la pola psikologo Stefan BALEY pruvas, ke la homo aplikas memlernadon ekde la bebaĝo (la infano ja mem lernas iradi kaj paroli) — kvankam komence ĝi senpripense estas obea al la „interna memdirektado". La procedo daŭras ekde infan- ĝis oldulaĝo.

# La terminologio kaj difinoj

Krom la vorto **memlernado** oni uzas ankaŭ la difinon **memedukado.** En la pli vasta senco ĝi signifas la samon, kion la memlernado, sed en la pli malvasta ĝi indikas formadon de propra karaktero morala kaj de la estetika sentemo.

Kiel la procedo estas malnova kaj historia atestas la fakto, ke la vorto memlernado ne troviĝas en la vortaroj de XIX jarcento. Komencis ĝin apliki nur la „pozitivistoj", i. a. Dygasiński en la disertacio: „Kiel lerni kaj instrui" /1889 j./

Kion do signifas la difino „memlernado", kiel oni povas karakterizi la proceđon, kio specifa estas en ĝi? La esploroj pruvis iun regulecon, nome tian, ke la persono lernanta ekster lernejo kaj sub sia propra kontrolo imitas ĉiam la modelon, al kiu li klopodas similiĝi per la memlernado. La modelon li trovas en sia viva medio aŭ en la tradicio familia aŭ pli vaste — en la romano, en la filmo. Malpli ofte la memlernanto konstruas la modelon el la elementoj, kiujn liveras la socia vivo. Laŭ F. Znaniecki: **La propravolan klopodon, por similiĝi per propra streĉo kaj sub propra kontrolo al la elektita modelo ni nomas memlernado.** Oni povas diri alivorte, ke la memlernado signifas: **gvidi propran kulturan evoluon.**

# La motivoj kaj sintenoj

Oni povas distingi tri ĉefajn motivojn de la memlernado: la psikajn, la sociajn kaj la praktikajn. La **motivoj psikaj** aperas tiam, kiam la memlernanto strebas transformi sian personecon, kiam li ekzemple deziras pli profundigi la konscion, perfektigi la karakteron, riĉigi la intelekton, perfektigi siajn moralajn normojn ktp.

La **motivoj sociaj** akompanas la klopodojn akiri tiajn ŝanĝojn, por atingi pli bonan socipozicion aŭ kaŭzi la ŝanĝon de la propra funkciado en la socia grupo, ekzemple maturekzameniĝi, eniri la „pli altajn" societajn sferojn ktp.

La **motivoj praktikaj** konsistas en la intenco atingi lertecon en iu aparta kultursistemo, ekzemple la estetika, la scienca, la teknika, la lingva ktp.

Oni povas ankaŭ distingi tri tipojn de memlernantoj laŭ iliaj sintenoj kaj farmanieroj. La unuan kaj la plej grandan grupon formas tiuj, kiuj manifestas la ĝeneralan deziron ŝanĝiĝi bonsence, sed sen iu ajn konkretigo. Ilin maltrankviligas la ĝisnuna stato, ili ne estas kontentaj pri si, ili sentas la bezonon ŝanĝiĝi, sed ne havante antaŭ si ian logan modelon imitindan ili erarserĉas kvazaŭ en nebulo.

Al la dua apartenas tiuj, kiuj, elektinte la modelon por similiĝi, havas klaran kaj videblan celon de sia memlernado, sed ili ne konas la metodojn por efektivigi ĝin, ĉar ili ne vidas la vojojn kondukantajn plej mallonge al la elektita celo. Tial ili ofte vagas vane. Ili scias kiu estiĝas aŭ kion ŝanĝi en si, pliperfektigi aŭ enigi, sed ili ne konas la manierojn realigi la ŝanĝojn. La grupo estas malpli granda ol la dua.

La tria grupo, distingata laŭ la sinteno kaj farmaniero estas plej malgranda kaj plej matura. Tiaj memlernantoj havas klaran konkretan celon kaj konas bone la vojojn kondukantajn al ĝi. Ili scias kiu estiĝas, kion lerni aŭ kion en si ŝanĝi kaj ankaŭ konas la manierojn aplikendajn en la farado. **Pri tiaj oni povus diri, ke ili havas celon, programon kaj sistemon aŭtodidaktan.**

Al tiuj tri situacioj kaj tri farmanieroj de memlernantoj konvenas iugrade la tri tipoj de parencaj legantoj aŭ eventuale radiaj kaj televidaj spektantoj.

La unua tipo — la leganto aŭ spektanto malkoncentriĝinta en interesiĝoj kaj erarvaganta en amaso de scifontoj.

La dua tipo — la leganto miregita pro malkovro de multeco da libroj pri la interesiĝanta lin temo kaj iom konsterniĝinta pro manko de la konvena metodo kiel elekti la bezonan libron, ĝustan por sia nivelo.

La trian tipon formas la leganto matura, scianta elekti la scifontojn por si, studanta ilin konforme kaj praktike, t. e. fortŝpareme kaj profitdone: dum mallonga tempo li scipovas multon tralegi kaj kolekti la konvenajn notaĵojn.

Ni aldonu la observojn el la eduka psikologio, laŭ kiuj la grava faktoro de la memlernado estas la kritika pritakso de si mem, atingata per ĉiama komparado de la propra persono kun la aliaj. La konfrontado iĝas ofta kaj konscia laŭ la aĝokresko. Ju pli la edukiĝanto foriĝas de la infanaĝo, des pli la memanalizado kaj memkritikado (ĉe la normala stato de la inteligenteco) iĝas pli ofta kaj pli profunda. La memkritika pritakso permesas koni siajn proprajn mankojn.

## La nuntempaj kaŭzoj de memlernado

Kvankam la memlernado kiel socia fenomeno ne havas ankoraŭ eĉ du jarcentojn, ĝi entute ne similas al sia trapaso en XIX jarcento. Krom la sufiĉe universala nuntempa lernejo-instruiteco la ĉefa kaŭzo de tio estas la nuntempa maniero produktadi, la ŝanĝitaj produktaj fortoj. La „patrino" de kleriĝado de plenaĝuloj kaj de memlernantoj estis la ŝanĝoj en produktmanieroj kaj en sociaj rilatoj, do en la kulturo dum XVIII kaj XIX jarcentoj. Tiam aperis la fabrikoj posedantaj la simplajn maŝinojn. Nuntempe la fabrikoj plene mekanikiĝas, eĉ pli — eniras la fazon de aŭtomatiĝo. La ŝanĝoj sekvas tre rapide kaj plirapidigas la progreson de industria civilizo, forte influante la novajn atingojn en diversaj sciencobranĉoj.

„La ritmo de progreso estas pli kaj pli rapida — la homaro estas atestanto de pli granda progreso dum lasta jarkvindeko ol dum antaŭaj dudek jarcentoj ..." — konstatis jam en la 1958-a jaro BOYD ORR — laŭreato de la nobelpremio.

La ŝanĝoj en la manieroj de produktado kaŭzas, ke la modernaj produktejoj fariĝas samtempe la sciencaj laborejoj. La konsekvenco de tiuj ŝanĝoj estas nepra laborigado de la homoj pli kaj pli bone instruitaj. Kiam ankoraŭ antaŭ nelonge la fizikaj laboroj konsistigis 80% de ĉiuj laborantoj, nun ili formas jam nur 60% kaj dum du aŭ tri jardekoj ili malmultiĝos ĝis 20%.

Samtempe kreskos la nombro da teknikistoj mezinstruitaj kaj la nombro de alte kvalifikitaj inĝenieroj, administristoj kaj sciencistoj laborantaj en la industrio kaj terkulturado.

La situacio forte influas la memlernadon de la laborantaj homoj, kiuj devas akiradi pli kaj pli da scio. Due la uzino transirante el la produkta en la produkta-laboratoria starigas antaŭ la laboranto novajn taskojn por solvi, i. a. la taskojn inventajn kaj raciigajn. La fakto ankoraŭ pli devigas akiradi novan scion kaj scipovon.

Alia efiko de la rapidaj ŝanĝoj estas jam videbla nombro de tiuj, kiuj postulas alikvalifikon. Pli kaj pli urĝa afero komencis esti la neceso de humanisma kromklerigo por la kreskanta amaso da diplomitoj de teknikaj lernejoj: la teknikistoj, inĝenieroj, magistroj kaj doktoroj. Ambaŭ tiuj bezonoj estas senigataj per la memlernado. Ni aldonu, ke se antaŭe la memlernado estis kaj okazis tute laŭvole, nuntempe ĝi fariĝas deviga rilate al la plejparto de la laborantoj.

Sendube la menciitaj sociaj ambicioj estas grava kaj ĉiam funkcianta stimulo inkliniganta la homojn por memlernadi. Ŝajnas tamen, ke en la motivoj komencas superi la kaŭzoj ligitaj kun speciala klerigo kaj laboro.

La situacioj, kiuj instigas memlerni estas jenaj:

1. La profesia laboro pro ĝia konstanta kaj rapida perfektiĝo.
2. La unuflankeco de la instruiteco kaj strecado dum la laboro vekas la bezonon kompletigi la lamantan scion — la scion mankantan (ekz. teknikisto deziras scion humanisman, kaj la humanisto serĉas scion politeknikan ktp).
3. La aktiveco socia, partopreno en la politikaj partioj, en la vivo de la societoj profesiaj, kulturaj, edukaj ktp.
4. La laboro utila neprofesia, ekz. renovigado de la loĝejo fare de nefakulo, la konservado de lia aŭtomobilo, kulturado de la propra parcelo.
5. La interesiĝo, do ekz. la muzikado, aktorado, kolektado, turismo, sciencaj esploroj, eksperimentado ktp.

En ĉiuj menciitaj branĉoj la memlernado estas farado helpa kaj nepra. Tamen la pli larĝa ol antaŭe socia kondiĉo faras, ke oni devas adapti al ili la difinon. Ne ĉiam la memlernado estas efektivigata laŭvole, kiel skribis Znaniecki. Pli kaj pli ofte ĝi efikas el la labora devo. Ankaŭ ne ĉiam ni elektas mem la modelon por imiti, ĉar ni devas akcepti la modelon de la gvidaj instancoj. Same la kontrolo de nia memlernado ĉesas esti nur nia propra tasko, ekz. dum la studado koresponda. Prenante en konsideron tiujn kondiĉojn, pli ĝusta ŝajnas jena difino:

LA MEMLERNADO ESTAS LABORO POR SI MEM KUN CELO SIMILIĜI AL LA AGNOSKITA MODELO LAU LA AKCEPTITA PLANO KAJ METODOJ KUN PARTOPRENO DE SIA KONTROLO.

## Ĉu ni estas bone preparitaj?

Memorante pri la postuloj de la vivo, ni provu pritaksi la modelon de bone instruita homo, do bone preparita por memlernado. La homo:

- ekregis sufiĉe la fundamentojn de la ĝenerala scio kaj specialiĝis profesie,
- scipovas logike pensi kaj estas kritikema,
- flegas viglajn interesemojn,
- ekregis la teknikon de la mensa laboro,
- havas ambicion plue perfektiĝi kulture kaj lertigi siajn kapablojn,
- havas ambicion kree peni laŭ la morala kaj socia devo.

La menciitajn kondiĉojn devas akompani pluaj kvalitoj de la personeco, sen kiuj la memlernado ne sukcesas. Ili estas: sincereco rilate al si mem, fantazio, sen kiu ja oni ne povas imagi la modelon por si, persistemo kaj la kapablo kontroli sin mem.

Prof. d-ro Józef PIETER, skribante pri psikologiaj problemoj de la memlernado, atentigas pri la malforta socia amplekso de memlernado en la mondo. Por plibonigi la situacion, li konsilas eduki la organizantojn de la memlernado, aranĝi la konvenajn studojn en diversaj altlernejoj kaj **organizi multajn rondojn de memlernado en la societoj kaj asocioj.** Liaopinie la memlernadon oni devas komenci ekde la memkono kaj poste iniciati la batalon kontraŭ tio, kio tiel grave malhelpas al la homoj leviĝi al la pli alta nivelo, do kontraŭ la alkoholismo, kaj nikotinismo . . .

## El la metodiko de memlernado

Estas tempo transiri al kelkaj praktikaj pensoj, do al la rimarkoj el la metodiko ĉi-koncerna. La observoj de F. Znaniecki montris, ke inter la plenaĝuloj la pli bonaj memlernantoj estis tiuj, kiuj ekde la infanaĝo iris tra la vivo per propraj fortoj. Multe malpli bonaj estas tiuj, kiuj depost unuaj jaroj profitis la helpon de privataj instruistoj, guvernistoj ktp. Ĝenerale oni ankaŭ povas konstati, ke plej bone por memlernado prepariĝas tiuj, kiujn en la lernejo kaj dum kursoj oni instruas per la metodoj aktivigaj. Do pli efike estas, kiam instruisto ne donas la scion, sed inspiras la lernantojn kaj helpas ilin en la memfara akirado de scio. Estas ankaŭ bone, se la memlernanto komencas la procedon sufiĉe frue, jam en unuaj lernojaroj.

La metodikaj postuloj efikas ankaŭ el tri sintenoj karakterizaj por memlernantoj. Al tiuj, kiuj nur ĝenerale intencas ŝanĝiĝi plibonige ni devus antaŭ ĉio liveri la konvenajn modelojn de personeco, por helpi al ili en kristaligo de la decido kaj potencigi la volon de la similiĝo al la elektota modelo. La dua grupo, kiu jam havas modelon kaj vidas la celon, sed ĝi ne scias kiel al la modelo similiĝi, atendas de la klerigistoj la informojn pri la metodoj labori por sia bono. La trian grupon, tiun plej malgrandan, kiu konas bone celojn kaj metodojn, ni devus apogi en la perfektiĝo.

La devo de la klerigistoj rilate al memlernantoj estas liveri al ili la plej bonajn modelojn kaj ekzerci en la memfara tekniko de la menslaboro.

La memlernantoj penadas solaj aŭ en grupoj. La grupon kelkpersonan, kiun gvidas la memlernanto pli iniciatema kaj pli kapabla, ni nomas memlerna rondo. La grupon pli nombran, kiu laboras komune kun protektanto-specialisto el la konkreta sciobranĉo, ni nomas la memlerna ensemblo. Plej bone agas tiaj rondoj kaj ensembloj, kiuj planas ne por pli longe ol nur kelkaj monatoj. Tia plano ebligas efektivigon de la intencoj kaj kontentigas la partoprenantojn. La rondoj kaj ensembloj ankaŭ edukas socie kaj — rilate al Esperanto — ankaŭ internacie.

La klerigado tre longe vivis per la vigliga diro de F. Bacon, ke scio estas potenco. La diro ankaŭ hodiaŭ havas sian sencon kaj estas utila. La nuntempa vivo postulas de la organizantoj de klerigado la novan sloganon, nome, ke la potenco de nia jarcento estas verkado, raciigo, inventemo. Oni ilin plenumas nur tiam, kiam oni ekzakte memlernas sur diversaj niveloj.

Elpoligis mag. Tyburcjusz Tyblewski

**BIBLIOGRAFIO**

Stefan BALEY: Psychologiczne podstawy samokształcenia / Psikologiaj bazoj de memlernado /. En la verko komuna: Pedagogika dorosłych / Pedagogio de plenaĝuloj / sub red. de K. Wojciechowski, Warszawa 1965, PZWS, p. 651.

Czesław MAZIARZ: Proces samokształcenia / La procezo de memlernado /. Warszawa 1966, PZWS, p. 200.

Władysław OKINSKI: Procesy samokształcenia / La procezoj de memlernado /. Poznań 1935, Polski Instytut Socjologiczny, p. 100.

Władysław SPASOWSKI: Zasady samokształcenia / La principoj de memlernado /. Warszawa 1959, Ksiazka i Wiedza, p. 232.

Kazimierz WOJCIECHOWSKI: Praca umysłowa, podrecznik samokształcenia / La menslaboro, lernolibro /. Warszawa 1947, „Światowid", p. 167.

Kazimierz WOJCIECHOWSKI: Wychowanie dorosłych. Zagadnienia andragogiki / La edukado de plenaĝuloj. La problemoj de andragogio /. Wrocław 1966, Ossolineum, p. 593.

# La instruado de Esperanto

**De Rektoro Helmut Sonnabend**

**Jam ekzistas multaj konsiderindaj vicoj da lernolibroj, sed mankas ĝis nun bazaj esploroj rilate al didaktikaj kriterioj. Mia intenco estas skizi kelkajn esencajn trajtojn de la problemo. Do pritraktata estas la didaktiko, kiun ni volas limigi al metodo kaj metodiko. Dum la metodo ĉiam estas la aplikata vojo de la koncerna instruisto — pli kaj malpli subjektive —, la metodiko signifas la tutan amplekson de ĉiuj eblecoj, kiuj povas esti menciindaj.**

La termino **didaktiko** absolute nur rilatas al la objekto mem. Tiu fakto ne sole tuŝas la lingvon, sed validas ankaŭ por ĉiuj instrueblaj fakoj kaj objektoj. Ili, kiel historio, geografio, matematiko, aŭ kibernetiko, estas memleĝaj absolutaĵoj, kiuj mem vivas aŭ ekzistas sen instruado. Sed en la sama momento, kiam tiaj objektoj estas instruataj aŭ en lernejoj aŭ en universitatoj kaj el instrulibroj, ili fariĝas elementoj de la didaktiko. Ĝi do estas difinata unuavice de siaj regantaj leĝoj. Mi ne provas arbitre elekti aŭ konstati ilin, ĉar en ĉiu instruebla fako aŭ objekto loĝas propra leĝo, t. e. ĉiu instruobjekto posedas didaktikan leĝon en si mem, kaj ĝin mi nur trovas per esploro. Do, kontraŭe al la aliaj terminoj la didaktiko estas la instruleĝo.

Leviĝas la demando, kia estas la didaktiko de la Internacia Lingvo, laŭ kiuj leĝoj ni instruu nun? Mi povus simpligi la demandon kiel prof. Rákuŝa opiniante: „La ĉefa prin-

cipo de la Esperantoinstruado estas, ke gvidas tiun instruadon la samaj leĝoj kiel la instruadon de iu ajn fremda lingvo." Ŝajnas al mi, ke tio ne sufiĉas, ĉefe pro tio, ĉar li ne sciigas kiamaniere, t. e. laŭ kiuj didaktikaj principoj, oni instruas fremdajn lingvojn.

Nun estas la demando al la didaktiko adekvata al la senco de la lingvo mem. Ĉikobara pravas, kiam li diras: „Lingvo estas socia fenomeno, tio signifas, ĝi ne estas natura aŭ biologa aperaĵo."

Per la lingvo la homo esprimas sian penson, per la lingvo la homo komprenas aŭ akceptas la penson de la alia. Tamen la lingvo ne estas funkcio de la subjekto, kiu parolas, ĝi estas la rezulto de individua rolo kaj inteligenteco. Do lingvo ekestis tiam, kiam la homoj eksentis la bezonon, komuniki unuj kun la aliaj.

**„Lingvo estas rezulto de sociaj kontaktoj"**, diras ekzemple J. Vendryés, la franca lingvisto. Tial li opinias, ke nur esplorante la socian rolon de la lingvo eblas ricevi imagon, kio ĝi efektive estas, kaj ĉiuj modernaj esploroj gvidas al supre dirita difino: **la lingvo estas socia fenomeno.**

Kompreneble por la didaktiko gravegas nur la ekkono, kaj ni povas konkludi **la unuan didaktikan leĝon:**

**La lingvo estas nur lernebla en la homa socio mem.**

La pli ol nesufiĉaj rezultatoj de la multjara instruado en la diversaj lingvoj dum kursoj, en lernejoj kaj institutoj estas klarigeblaj pro pli aŭ malpli granda neatento de tiu leĝo. Ekzemple, kiam iu germana lernejklaso lernas la anglan lingvon, ĝi ja ne vivas en la adekvata socia medio, kaj la solvo de ĉi tiu problemo dependas de la metodo, kiun devas trovi la instruisto mem.

Konstatante la lingvon kiel socian fenomenon ni per partigo de la fenomeno trovas **la duan didaktikan leĝon:**

**La homo estas la portanto kaj la uzanto de la lingvo.**

Vere ni povas diri, ke la lingvo kaj la homo troviĝas en plena unueco, ĉar la lingvo sen la homo ne ekzistus, sed inverse la homo sen lingvo ne povus ekzistadi.

La psikologio detale esploris la lingvoevoluadon, kiu por la instruado estas de decida signifo por precize scii la unuajn etapojn de la lingvolernado.

La unuajn simplegajn komencojn de la malgranda infaneto — antaŭ la aĝo de du jaroj — ni devas konstati kiel konvergprodukton inter senĉese aŭdataj lingvosonoj kaj ĝiaj propraj bezonoj. La parollernanta infano ne estas nura ripetmaŝino, sed ankoraŭ ne lingvokreanto. **La lingva evoluado de la infano estas destinata de imitado kaj spontaneeco.**

La imitado diferencas al diversaj direktoj: baldaŭ ĝi estas nekonscia kaj neintensa, baldaŭ ĝi estas energia volaĵo. Sed ankaŭ la imitado ne estas daŭre konstanta, egala vojo. Ĉiu per imitado lernenda vorto devas esti **aŭdata, atentata, parolata kaj memorata.** Ni nun povas konstati **la trian didaktikan leĝon:**

**La infano aŭ la homo lernas la lingvon per imitado.**

La spontaneeco de la infano ne staras en absoluta kontrasto al la imitado. Kiu atente observas la lingvan evoluadon, povas konstati, kiamaniere la infano elektas la vortojn. El la amaso da vortoj, konstante trafantaj la orelojn, la infano unue utiligas nur iomete da vortoj, sed iom post iom ili pliiĝas laŭ la bezonoj de la infano. Kaj ĉi tie ni rekonas la unuajn signojn de la spontaneeco. La pokaze decidita vortelektado fariĝas efektive simptomo por la ĝistempe atingita maturecstato.

Nun fariĝas ankaŭ kompreneble, ke spite al grandaj individuaj diversecoj, ni trovas iun destinan regulecon en la sinsekvo de la lingvaj ŝtupoj. Ni povas ĝenerale distingi:

1. la ŝtupon de la nomfunkcio,
2. la ŝtupon de la agofunkcio,
3. la ŝtupon de la komunikfunkcio,
4. la ŝtupon de la socifunkcio.

En la unua ŝtupo la infano bezonas la lingvon kiel nomfunkcion, ekzemple ĝi diras: seĝo, lampo, muro; en la dua ŝtupo ĝi komencas diri: hundo bojas, patro skribas, patrino kuiras; en la tria ŝtupo ĝi rakontas aŭ demandas travivaĵojn kaj bezonojn. La ekkono de la lingva rolo en ĝia socia funkcio estas la plej alta ŝtupo de lingvoscio. Tiam la homo ne nur estas perceptanto, sed ankaŭ vivanta ero de la lingva organismo.

Do ni nun povas formuli **la kvaran didaktikan leĝon** por la lingvo:

> **La spontaneeco (do la esprimkapableco) fariĝas videbla en 4 ŝtupoj: nomfunkcio, agofunkcio, komunikfunkcio kaj socifunkcio.**

Tamen estas necese apartigi la imitadon pro la granda graveco por la lernado. Estas imageble, ke pluraj povus diri, ke la imitado ne taŭgas por plenkreskuloj, sed nur por infanoj. Tio ŝajnas al mi granda eraro, ĉar pripensante la jam menciitajn principojn, ni ja ĝenerale konkludis la validecon por la homo mem. Laŭ mia opinio kuŝas ĉi tie la ĉefa punkto de nia instruado.

Mi bone scias, ke ofte la lernolibroj kulpas, ĉar ili laŭ sia naturo partigas la lingvon laŭ lingvaj elementoj. Ili por si mem — kvankam ĝustaj — ne tuŝas niajn instruajn vidpunktojn. Nur pripensu: Ĉiu homo, kiu el diversaj kaŭzoj transloĝiĝas al fremdlingva lando, lernos la lingvon imitante ĝin, tute egale ĉu infano aŭ plenkreskulo.

Kompreneble mi ankaŭ devas konstati, ke estas necese distingi plenkreskulojn laŭ klera edukado, ĉar homoj regantaj fremdajn lingvojn multe pli rapide lernas plian lingvon ol homoj lernantaj Esperanton kiel unuan fremdlingvon, kvankam ankaŭ la spertulo daŭre imitas la lernotan lingvon per multlegado.

Por konkretigi la teoriajn aspketojn mi nun skize aplikos ilin kunlige kun la punkto 1 (ŝtupo de la nomfunkcio) en malgranda leciono. Antaŭe estas necesaj kelkaj rimarkoj: Ĉiu leciono havu iun ajn lingvotuton kiel elirpunkton! Neniam komencu nur per unuopaj vortoj, ĉar la lernanto ĉiam devas sperti la lingvon kiel vivantan tuton!

Kiamaniere vi nun povas prizorgi la aferon, por ke viaj lernantoj ekvivu tiun tutecon? Ni havas du eblecojn: 1. per aŭdado, 2. per legado.

Por la aŭdado mi distingas same du eblecojn: Aŭ oni uzu la voĉlegadon, aŭ oni uzu la sonbendon. Mi ĉiam preferas la lastan, ĉar unue mi povas bone prepari la lingvaĵon kaj due ĝi ebligas al mi samtempe la objektivan observon de la lernantoj.

Iam mi aŭskultis Esperanto-instruadon de kursgvidanto, kies lernantoj nur voĉlegis el lernolibro. Tio estas netaŭga metodo, kaj tial mi emfazas, uzu unue la senperan lingvon. Kiel instruekzemplo servu naskiĝtago.

**Leciono**
**Elirpunkto:** Naskiĝtago. **Lingva celo:** Substantivoj. **Apliko:** Imitado en la ŝtupo de la nomfunkcio.

1. Por ke la lernantoj spertu la lingvon ĉiam kiel tutecon, ili komence aŭdu surbendigitan lingvaĵon:

„Bonan tagon! Mi gratulas vin pro via naskiĝtago, kaj jen estas mia donaco por vi." — „Dankon, tio estas ja bela libro." — „Ho, maljuna knabo, ankaŭ mi gratulas vin pro via naskiĝtago. Mi havas same donacon por vi." — „Dankon, kara amiko. Sed maljuna knabo . . . ? Ho, tio estas ja belega kravato!" — „Kara Horst, mi kore gratulas vin pro via naskiĝtago. Jen estas botelo da konjako. Ĉu vi ŝatas?" — „Ho jes, ĝin mi ŝatas ĉiam. Konjako estas bela trinkaĵo. Sed nun, karaj amikoj, lasu nin trinki kafon!" (Oni aŭdas ĝeneralan bruon, kaŭzata per seĝoj kaj eksido ktp.) „Tio estas belaj tortoj!" — „Jes, tio estas nuksotorto kaj la alia ĉerizotorto." — „Mi petas, donu al mi vian tason!" — „Jen estas mia taso." — „Ĉu vi ŝatas sukeron?" — „Jes." — „Ĉu vi ŝatas ankaŭ lakton?" — „Ne, mi ŝatas kafon sen lakto." — „Sed mi ŝatas kafon kun sukero kaj kun lakto." — „Jes, vi estas ja dolĉa knabo." — „Kaj nun trinku kaj manĝu, en la kafopoto estas sufiĉe da kafo."

2. Nur unufoja aŭdado ne sufiĉas. La lernantoj aŭdu la lingvon plurfoje. Dum la ripetadoj donu ankaŭ la tradukon, ĉar estas nature, ke la lernantoj volas scii la sencon. Plue, skribu dum la aŭskultado la imitotajn substantivojn al la tabulo.

3. Sur la tabulo staras nun jenaj vortoj: naskiĝtago, donaco, libro, knabo, amiko, kravato, botelo, trinkaĵo, kafo, torto, nukso, ĉerizo, taso, sukero, lakto, kafopoto.

4. Nun estas la tempopunkto por imitado. Samtempe kun la voĉa legado montru la objektojn aŭ senpere aŭ per desegnaĵoj. En ĉi tiu kazo havigu nur verajn objektojn, por la vorto „naskiĝtago" prenu bildkarton por la festa tago. La vorto „trinkaĵo" estas bona „ar-vorto" por lakto, kafo kaj konjako.

5. Forviŝu de la tabulo la alskribitajn vortojn!

6. Nomu ripete la vortojn kunlige kun la objektoj kaj samtempe lasu imiti vian parolmanieron!

7. Distribuu antaŭpreparitajn kartojn, sur kiuj estas skribitaj la unuopaj vortoj. Do, kafopoto, torto, taso, ktp.!

8. Instigu viajn lernantojn, meti la kartojn antaŭ la ĝustaj objektoj (plurfoje kaj ĉiam parolante)!

9. Ankaŭ inverse faru tion, distribuante la objektojn mem!

**Rimarko:** Ju pli da aplikeblecoj vi trovas, des pli efika estas ĉi tiu instrua ŝtupo.

10. Ne malpli grava ol la komenco de la leciono estas la fino. Denove aŭdigu sonbende la lingvaĵon, ĉar la komence difuza tuteco de la lingvaĵo nun jam reliefiĝas. Rekomendinda estas ankaŭ la disdono de la skriba teksto same utiligebla por pliaj lecionoj.

**Postrimarko:** Mi do konsideras la imitadon kiel tre gravan didaktikan paŝon, kiu estas metodigenda. El pluraj eblecoj, apliki la imitadon, mi finfine kaptas du: Uzu diligente kantolibrojn, studu zorgeme prelegojn kaj bonajn rakontojn!

C Informoj el la pedagogia vivo

# INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

## Estraro de la Ligo

(1971—1973)

1. Prezidanto = S.ro Raif Markarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Essex (Britujo)
2. Vicprezidanto = Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, 3161 Dollbergen (Okc. Germanujo)
3. Sekretario = D.ro Mario Dazzini, Casella Postale 22, 54 100 Massa c. (Italujo)
4. Vicsekretario = S.ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin Pontarlier (Francujo)
5. Kasisto = F.ino Dora Andersson, Klarbärsgatan 6 A Linköping 58 246 (Svedujo)

## Sekciestroj de la Ligo

| | |
|---|---|
| Aŭstralio | = Ivan Maddern, Box 411, Morwell 3840, Victoria. |
| Aŭstrio | = Josef Wesian, Rannachstraße 3, 8046 Graz. |
| Britujo | = Raif Markarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Essex. |
| Bulgarujo | = Vasil Bozarov, ulica Ljubotran 98, blok 4, vhod A, Sofio. |
| Ĉeĥoslovakio | = Vlastimil Novobilsky, Skolni 5, Ustí nad Labem. |
| Danlando | = Lis Thune, Brembärvänget 15, Hvidovre. |
| Francio | = (provizore) Gaston Turin, 43 rue Emile Magnin, Pontarlier. |

| | | |
|---|---|---|
| Germanio | = | Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, 3161 Dollbergen. |
| Hispanujo | = | Felipe Gonzales Del Pino, Dona Maria de Molina 15c, Sevilla. |
| Hungarujo | = | Emilia Radvansky, Damyanich u. 21, Budapest XVII. |
| Italujo | = | Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, 54 100 Massa C. |
| Jugoslavio | = | D.ro Miodrag Stojanoviĉ, Duruntorska ul. 2/IV, 32, Beograd. |
| Kanado | = | George Du Temple, R R 1, 814 Ardmore Drive, Sidney B. C. |
| Nederlando | = | (provizore) A. Bloemhard, hoefladlaan 58, Den Haag. |
| Novzelando | = | F. Fleming, P. O. Box 5042, Wellington. |
| Pollando | = | (provizore) Jozefo Toczyski, skr. Poert. 57 ul. Lejbuska 663 Gdansk, Chetm |
| Suda Koreujo | = | Dae-Young-Rhie, 204-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po ku Seoul. |
| Svedujo | = | Svennard Svennson, Ljungby. |
| Svisujo | = | Claude Gacond, Mieville 1333, La Sagne, Neuschatel. |
| Usono | = | Dorothy Holland, 1010 Crestwood Place, Santa Barbara, Calif. 93 105. |

## Kunlaborantaj membroj aŭ izolitaj membroj

| | | |
|---|---|---|
| Belgujo | = | G. Vanbreuse, Ma Campagne 319, Verviers. |
| Kubo | = | Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila. |
| Suda Afriko | = | Felix Woolf, 1 Shaftesbury, Piccadilly Walk, Sea Point Cape Town. |

## Konkludoj kaj decidoj de la Internacia Instruista Konferenco de ILEI, Maribor 26 — 31 de julio 1970

**1. Baza dokumentaro por uzo inter la neesperantistoj kaj oficialaj instancoj en ĉiuj landoj**

La estraro decidis uzi la disponeblajn dokumentojn de I. S. E. D. (Italio- Varese, Via Sacco 14 3 Gaetano Caraffa) por prezenti ilin ĉe la politikaj kaj instruinstancoj en la diversaj landoj. Plie la estraro sugestas same uzi la dokumentojn de CED kiuj rilatas al instruado.

**2. Infangazetoj kaj literaturo**

La estraro rekomendas abonon de la stencilita revuo „Nia Voĉeto" eldonata de Sateb (S-rino E. Prent, 27 Argyle Road, Ilford, Essex, Britio).

La Estraro konsideras subteni eldonon de nova revueto por la aĝo-grupe 12 ĝis 15 jaraj infanoj.

La estraro emfazas nepre partopreni en „Grajnoj en vento" (S-ro Marcel Erbetta, Rue des Pins 66, Bienne Biel, Svislando).

La estraro varme petas subteni la „Kastoran Klubon" (S-ro Sullivan James H- 3 Berwick Avenue, Manchester, M 31 I PS-Britio) kaj aligi la infanojn al tiu klubo, ĉar ankaŭ ĝi eldonas taŭgan legmaterialon.

**3. Feriaj centroj por gejunuloj**

La estraro decidis akiri interkonsenton kun UEA transformi la Infankongreseton en veran Infankongreson nomante ĝin „Internacia Infankongreso de UEA" tiel ke ankaŭ aĝogrupoj ĝis nun ne akcepteblaj (infanoj inter 13 ĝis 16 jaroj) povu partopreni la kongreson.

La estraro planas la starigon de feriaj centroj (i. a. en Gresillon kaj Montpellier (Francio), en Primoŝten kaj Rjeka (Jugoslavio), en Szeged kaj Balatonszemes (Hungario).

**4. Internacia Pedagogia Revuo**

La estraro decidis

a) ke la landaj sekcioj respondecas pri deviga abono de ĉiu membro al I P R

b) ke la landaj sekcioj respondecas pri la kvanto de la artikoloj sendendaj al la redaktoro de I P R.

Krome la estraro rekomendas, ke ĉe ĉiu landa sekcio oni starigu komisionon, kiu prizorgu la elektadon kaj sendadon de la artikoloj.

c) ke la sekcioj akiru reklamojn por I P R.

**5. Televida kurso de Esperanto**

La estraro decidis subteni la klopodojn en Nederlando por la starigo de televida kurso de Esperanto kaj sugestas, ke la sekcioj siaflanke kontaktu la landajn televidinstancojn tiucele.

**6. Normigo de superaj ekzamenoj por Esperanto-instruistoj**

La estraro decidis akcepti la regularon proponita de rektoro Helmut Sonnabend kun la amendoj sugestitaj de la koncerna laborkomisiono.

**7. Normigo de la lernejaj instruplanoj, lernolibroj, oficiala eksperimento pri la paralela instruado de Esperanto en la lernejoj**

La estraro decidis:

a) la landaj sekcioj, kiuj ne apartenas al la Kunordiga Konferenco (t. e. Austrio, Bulgario, Jugoslavio, Italio, kaj Hungario) studos la eblecojn en sama maniero, krei aliajn zonojn inter najbaraj landoj por starigi la kondiĉojn rilate al eksperimenta instruado; ĝis kiam ne ekzistos la eblecoj por eksperimenta instruado, la estraro instigas al daŭrigo de instruado en la ĝisnunaj, formoj,

b) starigi bazan instruplanon, kiu garantias la unuecon de la instruado dum la eksperimento,

c) uzi por la eksperimento en la supera ŝtupo de la lernejo ekde la dekjaraĝo, komunan lernolibron senescepte „Esperanto 1 kaj 2" de d-ro Szerdahelyi,

ĉ) komisii la fakan gvidadon rilate al ĉiuj pedagogiaj studobjektoj al la Esperanto Fako de la Scienca Universitato Eötvös Lorand en Budapesto, kies fakestro estas Istvan Szerdahelyi.

**8. Pedagogia vortaro**

La estraro decidis starigi konstantan komisionon, kies tasko estu kompili ampleksan, taŭgan pedagogian vortaron sub la prezido de s-ro Josef Kühnel (Germanio, D 2000 Hamburg 72, Pferdekoppel 16).

# PROTOKOLO

de la intervjuo kun la reprezentantoj de la sindikatoj kaj
de la komunista partio de Slovenio, la 27/7/1970 — 11 h.
en Hotelo Tourist en Maribor

ĉeestas:

1. S-ro Tomaj Tomaĵin — el la Centra Komitato de la Komunista Partio el Ljubljana.
2. Dipl. Ekon Silva Gauman — el la Sindikato de socipolitikaj laboristoj el Ljubljana (Instruistoj)
3. Prof. Kastelic — prezidanto de Respublika Sindikato pri publikaj servoj.

4. S.ro Peter Winkler — memstara konsilanto de la Sekretariato por kulturo kaj klerigo, ĉeestas la prezidanto, la vicprezidanto, la sekretario kaj vicsekretario de ILEI. Protokolanto D-ro Mario Dazzini.

Al la Sindikato kaj al politikaj organizoj estis direktitaj skribe la jenaj demandoj:

1. Sistemo de edukado en Jugoslavio, pli detale en Slovenio.
2. Informo pri instruado de fremdaj lingvoj je ĉiuj ŝtupoj en la jugoslavaj lernejoj (deviga lernado de lingvoj);
3. Malfacilaĵoj kaj sukcesoj en la instruado de fremdaj lingvoj: prefere raportu persono, kiu ne estas preleganto pri fremdaj lingvoj, nur pedagogo, ekzemple inspektoro aŭ direktoro de lernejo k. s.
4. Rilato kaj sinteno de sindikato kaj politikaj organizoj al lernado de fremdaj lingvoj. en publikaj lernejoj.
5. Opinio de la sindikato kaj de politikaj organizoj pri celkonformeco (konveneco) de enkonduko kaj de regula instruado de Internacia Lingvo Esperanto en la lernejo. Ĉu estis pri tiu ĉi lingvo jam akceptitaj en la sindikato kaj en la politikaj organizoj ĝenerale iaj starpunktoj?

S-ro Vetrih, prezidanto de LKK, salutas la ĉeestantajn reprezentantojn de la Komunista Partio kaj de la Sindikatoj je nomo de la Organiza Komitato kaj de la Konferenco.

S-ro Markarian salutante je nomo de la estraro de ILEI dankas la ĉeestantojn pro la partopreno al la intervjuo kaj prezentas la unuopajn membrojn de la estraro de ILEI. Mallonge li klarigas la celon de la Konferenco, parolante pri la diversaj eroj kaj ĝenerale pri la statuto de ILEI kaj ĝiaj celoj.

Rektoro Sonnabend petas informojn pri la instruado ĝenerale en Jugoslavio.

Ĉiuj infanoj vizitas la infanĝardenon dum 3 jaroj, ĝis la 6a jaro. La elementa lernejo estas unueca kaj daŭras 8 jarojn; la lernantoj eniras la elementan lernejon je la 7a jaraĝo ĝis la 15a jaraĝo. Post la elementaj lernejoj la lernantoj, vizitas la fakajn lernejojn kiuj daŭras 2 aŭ 3 jarojn. La Universitatoj povas esti vizitataj post ekzamento. La instruado okazas dum 6 tagoj; 26 horojn entute: estas antaŭvidite, ke oni mallongigos la instrusemajnon al 5 tagoj.

En la klaso oni povas havi 15 lernantojn minimume kaj 35 maksimume.

Pri la instruado de fremdaj lingvoj: en la lastaj 4 jaroj de la elementaj lernejoj (12-15 jaraĝaj lernantoj) oni lernas la anglan lingvon kaj kiel duan, la germanan. En Slovenio oni studas anglan kaj serbokroatan lingvojn en la 6a klaso de la elementaj lernejoj; por la Slovenoj la angla lingvo estas pli malfacila ol la germana lingvo.

La reprezentanto de la sindikato klarigas, ke la sindikatoj ne okupiĝas pri sugestoj de ŝanĝoj de la instruprogramoj: aliaj organizoj zorgas pri fakaj kaj instruaj problemoj.

La Instituto pri la lernejoj havas kontrolan funkcion kaj pri la laboro kaj la scienco.

La lerneja konsilantaro zorgas precipe pri la financaj problemoj de la instruado.

La prezidanto Markarian demandas kian opinion havas la sindikatoj kaj la politikaj instancoj pri la propono de enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

La sinteno de la sindikatoj rilate la problemon estas pozitiva, ĉar tia instruado estas interesa: tamen la sindikatoj oficiale ne okupiĝis pri la problemo.

La dipl.-ekonomisto Silva Bauman timas, ke instruado ĝenerale de alia fremda lingvo en la elementaj lernejoj estos ŝarĝo de la programo.

La problemo estas tasko, laŭ politika vidpunkto, de la ideologia komisiono de la Komunista Partio kiu okupiĝas pri ĝeneralaj problemoj de edukado, sed ankoraŭ oni ne pritraktis la problemon pri la instruado de Esperanto.

En aŭtuno oni pritraktos la problemon pri klerigado kaj S-ro Tomaj Tomaĵin promesas, ke la ideologia komisiono dediĉos kunsidon al la propono de instruado de Esperanto en Jugoslavio en rilato ankaŭ kun tio, kion oni faras en la najbaraj landoj. Se oni trovos

ke tiu instruado povos esti utila, la ideologia komisiono apogos la proponon pri instruado de Esperanto en la lernejoj ĉe la kompetentaj instancoj kiuj devos fine decidi.

La proponata eksperimento certe renkontis bonvolemon sed tamen oni devas ankoraŭ decidi kaj la rezultoj de la eksperimento povos esti barometro pri la valoro de la instruado de Internacia Lingvo Esperanto en la lernejoj.

## Regularo de la Internacia Ekzameno Por Instruistoj membriĝintaj en Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj

Decidita de la asembleo de la Ligo okaze de Instruista Internacia Konferenco de ILEI (27—31 julio) 1970 Maribor-Jugoslavio.

**Art. 1 Celo**

La Internacia Ekzameno por Instruistoj estas orda institucio de ILEI kaj intencas du celojn:

(a) atingi egalan nivelon de instruado de la Internacia Lingvo Esperanto;

(b) atesti surbaze de kutima ekzameno la kapablon, instrui Esperanton je ĉiuj lernejaj ŝtupoj.

**Art. 2 Kompetenteco**

(1) Por la funkciado de la ekzamenoj kaj por la rekono de la instruista kapablo respondecas la Ekzamena Komisiono de ILEI, mallongite EKI.

(2) Ĝi komisias el la landaj sekcioj de ILEI landajn ekzamenkomisionojn. Nomo: Landaj Ekzamenkomisionoj (LEK).

(3) La prezidantoj de LEK destinas lokon kaj tempon de la ekzameno.

**Art. 3 Taskoj de la Ekzamenaj Komisionoj**

(1) La LEK-oj ekzamenas la kandidatojn laŭ la regularo aprobita de Asembleo de ILEI kaj respondecas pri zorgema laŭregula plenumo.

(2) La ekzamenado devas esti protokolita.

(3) La LEK decidas per la plimulto pri la rezultato de la ekzameno.

(4) La prezidanto de LEK sendas la ekzamenan protokolon multobligite al la prezidanto de EKI.

**Art. 4 Taskoj de EKI**

(1) Ĝi respondecas la unuecon de la ekzamenaj postuloj kaj havas la rajton, sugesti kaj kontroli la ekzamenajn tekstojn.

(2) Ĝi kreas plej eble objektivan mezurilon por la prijuĝo.

**Art. 5 Diplomo kaj juĝnoto**

(1) Ĉiu sukcesinta kandidato ricevos diplomon, kies titolo estas: Internacia Diplomo De ILEI Pri Instrukapablo De La Internacia Lingvo Esperanto

(2) La diplomo indikas la juĝnoton laŭ jena skalo:
tre bona (1)
bona (2)
kontentiga (3)

(3) La kandidato malsukcesas Kiam
(a) aŭ la tuta juĝnoto estas pli malbona ol 3, 49;
(b) aŭ la kandidato ricevas en du partoj de la ekzameno la juĝnoton malbona (4)

(4) La diplomo entenas indikojn pri la nomo, naskiĝdato-loko, lerneja stato, lando kaj loko de la diplomito.

(5) La diplomo devas esti plenigita laŭ la ekzamenprotokolo kaj subskribita de prezidantoj de EKI kaj LEK.

(6) Diplomito rajtas uzi la titolon „Internacia Esperanto-Docento".

### Art. 6 Ĝeneralaj kondiĉoj

Antaŭpremiso por la allaso estas:

(a) La kandidato jam devas posedi instruoficon en ia ajn lerneja tipo, aŭ intencas akiri ĝin (studentoj, en pedagogiaj altlernejoj).

(b) La anonco al la ekzameno, direktata al la LEK, devas esti skribata en Esperanto.

(c) La kandidato pagas post la aprobo de la anonco la ekzamenkotizojn en la konton de la landa organizaĵo. Ĝi siaflanke ĝiras la duonon de la kotizoj en la konton de ILEI.

### Art. 7 Enhavo de la ekzameno

(1) La disertacio

(a) La temon fiksas kaj skribe transdonas al la kandidato la prezidanto de LEK. Li konsideras de la kandidato deziritan kampon.
(aa) Por la prilaborado de la disertacio la kandidato havas tempon 3 monatojn-kalkulite ekde la tago de poŝta transdono.

(b) La kandidato verkas disertacion en Esperanto.

(c) Se la kandidato ne plenumas la limdaton la prezidanto de LEK deklaras la ekzamenon kiel malsukcesan. Nur en kaŭzoj de absoluta neebleco la limdato povas esti plilongita.

(ĉ) La prezidanto transdonas la verkitan disertacion por prijuĝo al la komisionanoj. La prijuĝo finas per jenaj juĝnotoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Tre bona | (1) | kontentiga | (3) |
| bona | (2) | malbona | (4) |

(d) La kandidato preparas la disertacion je la kutimoj de universitataj kondiĉoj. Lokoj de la disertacio, kiuj tuŝas laŭvorte aŭ laŭsence aliajn verkojn, devas esti en ĉiu unuopa kazo indikitaj kun aldono de la fonto.

(e) Se la disertacio estas malbone prijuĝita, la prezidanto en la nomo de LEK rifuzas la pluan ekzamenon.

(2) La lingva ekzameno

(a) La lingva ekzameno postulas superan scion pri la Internacia Lingvo.

(b) Dum la skriba ekzameno la kandidato devas
(aa) traduki antaŭmetitan sciencan tekston (aŭ beletran) en la nacian lingvon,
(bb)) traduki inverse nacian tekston (sciencan, beletran) en Esperanton,
(cc) prirespondi 15 frazojn el la gramatiko kaj vortfarado. El ili devas esti responditaj almenaŭ 10.
(ĉĉ) korekti kaj plibonigi 10 frazojn el la gramatiko kaj vortfarado, en kiuj troviĝas eraroj.

**Rimarkigo:** La kandidato disponas por la tradukoj (esperante, nacilingve) po 2 horojn. Por (cc) kaj (ĉĉ) estas disponata po duonan horon.

(c) La buŝa ekzameno daŭras unu horon. Ĝi konsistas el
(aa) laŭtlegado kaj klarigado de Esperanto-teksto
(bb) ekzameno pri E-literaturo kaj pri la plej ĉefaj tradukaĵoj de famaj verkoj en Esperanton
(cc) ekzameno pri la mondlingva problemo kaj pri la ĉefaj punktoj de la historio de Esperanto.

(3) La metodika-didaktika ekzameno

(a) La kandidato prezentas skribe ellaboritan instruobjekton.
(aa) La instruobjekto enhavu aŭ enkonduken en gramatikan parton aŭ pritraktadon de ia literatura teksto (rakonto, poemo . . .)

(b) En la aliĝa konversacio la kandidato ekspliku la didaktikajn kaj metodikajn principojn de la ellaborita instruobjekto.

(c) La kandidato devas koni surbaze de sciencaj verkoj la nunstatan metologian esploron pri lingva instruado.

**Rimarkigo:** La metodika-didaktika ekzameno daŭras 45 minutojn, kondiĉe la plano pri la instruobjekto estas antaŭe skribe ellaborita.

**Art. 8 Ripetado**

Kaze de malsukceso la ekzameno povas esti ripetata en tiuj punktoj, en kiuj la kandidato malsukcesis. La EKI decidas en interkonsento kun la kandidato pri la dato de tiu ripetota ekzameno.

Instruado de Esperanto en la fakultato de

## Beletroj en Clermont Ferrand (Francujo)

**— el artikolo de prof. Janton —**

Esperanto estas nedeviga elektebla fako por la studentoj de la unua kaj dua studjaroj. Same kiel por la aliaj elekteblaj fakoj nedevigaj nur estas kalkulataj por la prijuĝo la poentoj situantaj super la meza noto. Komencinte la lernadon de Esperanto multaj studentoj konsciis, ke ĝi por ili povas fariĝi tre valora helplingvo. Pro tio la nombro de la lernantoj kreskis dum la unua trimestro. Komence enskribiĝis 40 studentoj, iom poste kreskis la nombro je 96. Du trionoj el tiuj studentoj apartenis al la lingvista sekcio kaj unu triono al la psikologia, franclingva, historia kaj geografia sekcioj.

Ekzistas du grupoj, kiuj lernas po tri horoj semajne. Du el tiuj stud-horoj gvidas profesoro, kiu instruas teoriaĵojn pere de kurslibro kaj originalaj Esperanto-verkoj. Tiu kurslibro ampleksas 10 lecionojn donantajn la gramatikan bazon, kiu sufiĉas por studi esperantlingvan verkon ankoraŭ en la sama jaro. La 3-a horo estas antaŭvididata por paroligi la lernantojn. Kapabla lernanto, komisiita pro tio estras la ekzercadon. Kompreneble li laboras sub la respondeco de la profesoro.

Krom la fakultataj kursoj ekzistas alia, dissendata de Radio-Auvergne en la programero „Instruado per radio kaj televido". Tiu kurso celas la studentojn, kiuj ne povas viziti la fakultatajn kursojn. Dank' al ĝi ni ricevis multajn leterojn, kiujn sendis tre diversa publiko. Tio pruvas, ke tiu dissendo ne nur atingis studentojn sed ankaŭ aliajn interesiĝantajn homojn. Plue la lernantoj ricevas helpon fare de Internacia Koresponda Servo, kies loko estas en nia urbo. Personoj, kiuj deziras korespondi, povas ricevi la adresojn de unu aŭ pluraj korespondantoj samaĝaj el universitatoj japanaj, polaj, ĉeĥaj, hungaraj kaj sovetuniaj.

La nombro de la studentoj, partoprenintaj la kurson, ilia atingita bona nivelo, montras la pravecon de la fakultato, kiu iniciatis tiun kurson. Mi deziras publike danki ĉiujn miajn kolegojn, kiuj subtenis min, ĉiujn, kiuj helpis la realigon. Same mi dankas la Konstantan Delegitaron kaj la Dekanon de la Fakultato kaj la membrojn de la Esperantistagrupo.

La ekzemplo de Clermont Ferrand ricevis eĥojn el aliaj fakultatoj: en Tours kaj Aix- en — Provence esperantistaj universitatanoj provos aldoni siajn klopodojn al la miaj por disvastigi la Internacian Lingvon.

tradukis Pierre Babin el la franca

**Plialtigo de la infannombro en elementaj lernejoj kaj mezlernejoj, kie oni instruas Esperanton — en Hungario.**

Tre bonegan kaj detalan statistikon sendis la prezidanto de la Instrua Komisiono de HEA, fraŭlino Emilia Rádvansky. Laŭ la statistiko lernas en la lerneja jaro 1969/70 jenaj infanoj Esperanton:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. elementa lernejo: | 526 knaboj, | 910 knabinoj; | entute 1.436 |
| 2. mezgrada lernejo: | 49 knaboj, | 64 knabinoj; | entute 113 |

# Esperanto programita

En diversaj Esperanto-revuoj oni legis lasttempe pri la testkampanjo „TESTO-5000" de la pedagogia studento Hermann Behrmann (D-4972 Löhne 1). Li verkis programitan Esperantokurson (4 kajeroj kun 272 paĝoj + 4 EP-diskoj), kaj li jam trovis ĉ. 3550 personojn pretajn por testi tiun kursprogramon. La testantoj venas el 40 landoj. Interese kaj ĝojige estas, ke inter la testpersonoj troviĝas proks. 250 instruistoj kaj pli ol 300 studentoj pri pedagogio.

Ĝis nun la testmaterialo estas havebla nur en germana lingvo; sed baldaŭ aperos la angla eldono.

Lernado laŭ programo ĝenerale estas aŭtodidakta lernado (memlernado). Ĝi postulas energion kaj persiston fare de la lernanto. La programo estas konstruita jene, ke lernado funkcias sen instruista interveno. Per la testado oni volas ekscii, ĉu ĝi estas efika resp. kio ankoraŭ estas plibonigenda. La ĉefaj grandaj avantaĝoj kompare al la tradicia lernado estas: 1) ĉiu povas tuj komenci lerni, ĉar aparta instruisto ne necesas; 2) ĉiu lernas kiam li deziras, ĉu matene, tage, vespere aŭ eĉ nokte; 3) ĉiu lernas laŭ propra lernrapideco kaj kun aŭ sen multaj ripetadoj; 4) ĉiu lernas laŭ propra lernritmo.

## Ĉ Opinio — propono — deziro — sciigo

**Esperanto-elsendoj de POLA RADIO**

La Esperanto-elsendoj de Pola Radio estas komuna atingaĵo esperantista. De la esperantistoj do dependas la kvalito, kvanto kaj sukceso de la elsendoj.

La nova programo por la periodo novembro 1970 ĝis majo 1971 prezentas denove riĉan kaj varian enhavon:

Esperanto-ekspreso, koncerto kun bondeziroj, felietonoj „Pri kio oni parolas en Pollando", „La semajno en Pollando", „Panoramo de internaciaj eventoj", Anguleto por komencantaj esperantistoj, Leterkesto, Literaturaj kaj kulturaj programoj ktp.

La Esperanto-elsendoj estas aŭskulteblaj ĉiutage:

6,00 h — ondolongoj 41 m, 49 m, 200 m
16,30 h — ondolongoj 19 m, 25 m, 31 m

La horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo.
„Polaj produktoj en la mondo" estas la temo de nova konkurso de Pola Radio kaj Pola Ĉambro por la Eksterlanda Komerco.

Oni devas respondi al jenaj tri demandoj:

1. Kiuj polaj artikloj estas vendataj en via lando kaj kiel vi taksas ilin?
2. Kiuj produktoj de la pola industrio, laŭ via opinio, ĝuus sukceson en via lando?
3. En kiu urbo en Pollando okazas la ĉiujara internacia komerca soiro kaj kion vi scias pri tiu ĉi foiro,

La ĉefaj premioj de la konkurso estas 10-taga ekskurso tra Pollando. Respondojn oni devas sendi ĝis la 31 dec 1970 al POLA RADIO, Esperanto-elsendoj, P. O. Box 46, Varsovio 1.

Esperanto-programojn elsendas ankaŭ la radiostacioj de Bern, Roma, Zagreb, Vieno, Pekino kaj aliaj!

**PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (PIV)**

En julio 1970 aperis la „Esperanto-libro" de la jaro 1970, la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, redaktita de prof. Gaston Waringhien kaj eldonita de SAT.

**Bibliografiaj notoj:** 1298+XXXVII paĝoj, formato 15 x 20 cm, kun multaj tabeloj kaj ilustraĵoj, bind., prezo 101,90 GM.

Havebla ĉe Ludwig Pickel, libroservo, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2.

**Bibliografiaj informoj**

Antaŭ kelkaj monatoj aperis la dua eldono de „La Nobla Korano", tradukita de d-ro Italo Chiussi (Prezo 42,— GM). De la sama tradukinto aperis malgranda broŝuro „Kial mi kredas je l'islamo", radioparolado de la 2a kalifo de la Ahmadiyya Movado. Tiu broŝuro estas senpage havebla. La germana sekcio de KELI eldonis ĵus broŝuron kun la titolo „Ĉiama Memor-kalendaro" kun multaj kristanaj memordatoj. Ne mankas mencioj pri la Esperanto-movado. La broŝuro en formato DIN A 5 kostas 1,50 GM.

Ĝojige estas, ke haveblas pli kaj pli da taŭgaj diskokursoj. La diskokurso de A. Pettyn kun 4 mikrokanelaj diskoj kaj lernolibro havas specialan signifon el vidpunkto de prononcado. Profesiaj parolistoj de Pola Radio surparolis la diskojn kaj garantiis modelan prononcadon de Esperanto (Prezo de la kompleta kurso 48,50 GM). Jam de jaroj ekzistas la diskokurso „TRA LA MONDO" de A. Ribot kun 6 diskoj kaj 6 franclingvaj lernolibroj. Baldaŭ aperos aldona germanlingva broŝuro, kiu ebligas la uzon de la diskokurso ankaŭ por germanlingvanoj. La vendorajton por la germanlingva eldono de la kurso havas Ludwig Pickel, Nürnberg, la eldonanto de IPR. La vendoprezo por la kompleta kurso, 6 diskoj, 6 lernolibroj kaj 1 germana broŝuro, estas 60,— GM.

Inter la aliaj novaj diskoj menciindas la kantoj de MUZILO el Wroclaw (4 kantoj, 4,50 GM) kaj la kantoj de Ramona van Dalsem „Donu al mi vian manon" (4 kantoj 6,50 GM). Dana Esperanto-Eldonejo daŭrigas sian diligentan eldonagadon. Lasttempe aperis: Ni, homoj de Zora Heide (6 rakontoj, 4,90 GM); Somera Simfonio, sonetaro de A. Leenhard (4,90 GM); Disko, Ciklo da skizoj, originala verko de J. H. Rosbach (6,60 GM).

Tradukita el la angla lingvo kaj eldonita de Eldonentrepreno LANTERNO estas la broŝuro „La besto-farmo" de George Orwell. Tradukis ĝin Gerald Tucker, prezo 6,— GM. Du interesaj novaĵoj venas el Hungarujo. Hungara Esperanto-Asocio eldonis la fabellibron kun ĉarmaj koloraj ilustraĵoj „La sep reĝidoj" (Formato 25x34 cm), prezo 6,60 GM. Corvina, Budapest, prezentas nun elektitajn poemojn de Sándor Petöfi sub la titolo „Libero kaj amo" en la traduko de Kálmán Kalocsay, prezo 9,20 GM. Tre laŭdinda estas la ĉarma, solida vestaĵo, formato 10x19 cm, 260 paĝoj, bind. Ĉiuj libroj kaj diskoj estas haveblaj ĉe Ludwig Pickel, libroservo, Postfach 2113, D-85 Nürnberg, Germanujo.




**Albrecht Dürer kaj Esperanto**

La 21an de majo 1471 naskiĝis la genia germana pentristo, desegnisto kaj grafikisto Albrecht Dürer. Okaze de tiu 500a datreveno la naskiĝurbo de Dürer, Nürnberg, festos la jaron 1971 kiel la Albrecht Dürer-Jaron. Unu el la multaj aranĝoj de tiu jaro estos la 49a Germana Esperanto-Kongreso, Paskon de la 9a ĝis la 12a de aprilo 1971 en Nürnberg. Eksterlandaj gastoj estos tre bonvenaj, ili ne pagos kongreskotizon. Aliĝu ĉe Esperanto-Gruppe, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2, Germanujo.

Okaze de tiu aranĝo Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg, anoncas felietonan konkurson pri la temo „MIA RENKONTIĜO KUN ALBRECHT DÜRER". Dezirataj estas mallongaj noveletoj kaj eseoj en Esperanto pri rilatoj kaj renkontiĝoj kun Albrecht Dürer ĉie en la mondo.

Detalajn informojn donas Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2.

**Pri eduka influo de turismo**

En Pedagogia Fakultato de Varsovia Universitato daŭras preparoj por doktoriĝi, prezentante la tezon pri eduka influo de turismo. Ĉi-problema literaturo — tre malabunda — sukcese apogus la disertacion. Tial, se en via lando troviĝas iu ajn libro aŭ broŝuro pri turismo laŭ eduka vidpunkto; se vi konas iun eldonaĵon traktantan rolon de ĉiĉerono, eksplikisto aŭ kondukisto, bonvolu tuj sendi la libron, eventuale la informon pri ĝi/kun traduko de la titolo/. Ĉiu ricevita sendaĵo estos rekompencita per ilustrita albumo kun multlingvaj komentarioj/kun Esperanto inkluzive/. Sendu aŭ skribu al: mag. Tyburcjusz Tyblewski, JELENIA GORA, str. Bartka Zwyciezcy 11/1, Pollando. La periga rolo de Esperanto kaj esperantistoj estos aparte emfazita en la disertacio.

**12a Internacia Infana Kongreseto**

La Infana Kongreseto, kiel konstanta institucio de la Universala Kongreso, celas eduki infanojn al internacia amikeco per aplikado de la komuna lingvo Esperanto. La kongreseto daŭrigas la ekzemplon kaj etoson de esperantistaj familioj, kiuj en la ĉiutaga vivo uzadas la Internacian Lingvon. Sed la Infankongreseto bonvenigos ne nur denaskajn esperantistojn, sed ankaŭ lernejanojn, kiuj lingve bone progresis kaj kapablas partopreni en la kongreseto gvidata tute en Esperanto.

La 12a Infankongreseto okazos en feria centro St. Mary's Bay School Holiday Centre, de 30 jul ĝis 6 aŭg kun aldona libervola restado de 6 ĝis 13 aŭg 1971, en Anglujo. Rajtas partopreni infanoj de 6 ĝis 16 jaroj. Limdato por aliĝo estas 30 apr 1971. Gvidanto de la kongreseto estas s-ro Raif Markarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Essex, Britujo. Diversnaciaj geinstruistoj estas petataj sin anonci, se ili estas pretaj deĵori dum unu aŭ ambaŭ semajnoj. Informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe UEA, Rotterdam, Nederlando.

D Dokumentoj, laŭ kiuj Esperanto estas instruata en la lernejoj

LA PROGRAMOJ DE FILOLOGIA FAKULTATO

FAKO ESPERANTO LINGVO KAJ LITERATURO

# ENKONDUKO EN LA STUDADON DE ESPERANTO

**La instrutaskoj de la studobjekto**

La celo de la studobjekto: la alproprigo de bazaj konoj de la lingvo Esperanto, elformado de scioj kaj kapabloj.

Je la fino de la kurso: la studento:

a) estu kapabla kompreni fluan Esperanto-parolon, entenantan kelkajn nekonatajn vortojn;

b) scipovu konversacii en Esperanto pri la temoj de la ĉiutaga vivo;

c) estu kapabla kompreni kaj ĝuste traduki perhelpe de vortaro mez-malfacilan Esperanto-tekston, entenantan nekonatajn vortojn;

d) kapablu mez-malfacilan hungarlingvan tekston traduki Esperanten;

e) estu kapabla esprimi siajn pensojn Esperante, en skriba formo, simplastile.

**La materialo de la instruado**

1. Leksiko

a) La kvanto de alproprigeblaj leksikaj elementoj: 800 elementoj de la leksika minimumo. Krom la devige alproprigebla kvanto: internaciismoj kaj pli maloftaj vortoj kaj esprimoj, troviĝantaj en la lernolibro, kies kvanto ne povas superi la 15%-on de la deviga kvanto.

b) Temaro

Universitato, universitataj studoj, instruhoro. Organiza, movada vivo, korespondado. La hejmo kaj la familio, aŭtobiografio. La homa korpo, sano-malsano, sporto. La urbo, la urba trafiko, industrio, komerco, profesioj kaj metioj. En restoracio, hotelo, aĉetado. La vilaĝo, naturo, vetero, sezonoj, tempo. Plantoj, bestoj. Kino, teatro, galerio, radio, televido. Vojaĝo eksterlanden, eksterlandaj interrilatoj. La signifo de Esperanto en internaciaj rilatoj.

Kelkaj versaĵoj, proverboj, anekdotoj, kantoj.

2. Gramatiko

La son- kaj litersistemo de Esperanto. La vortelementoj kaj la bazaj reguloj de vortfarado. La afiksara sistemo kaj la vortkunmeto.

Morfologio: substantivo, deklinacio. Adjektivo: akordiĝo, komparado. La artikolo. Pronomoj, numeraloj. La adverbo kaj ĝia komparado. La sistemo de tabelvortoj. Verbo: modoj, tempoj, participoj. Simpla kaj kompleksa* konjugacio. Prepozicioj, konjunkcioj, subjunkcioj. La demandado kaj neado. La vortordo.

**La studobjekto** estas instruata dum enkondukaj ekzercoj en la 2-a studjaro / 3 kaj 4 semestroj / — 2 studhoroj ĉiusemajne.

**Ekzameno:** Post la 4-a semestro — raporto.

## ESPERANTO LINGVO I. kaj II.

**La instrutaskoj de la studobjekto**

Dum la instruado de la studobjekto oni firmigu kaj pluevoluigu la kapablojn, sciojn kaj konojn, akiritajn dum la studado de la studobjekto: Enkonduko en la studadon de Esperanto.

Rezulte de tio, je la fino de la kurso la studento

a) scipovu flue kaj esprimplene laŭtlegi kaj kompreni neelaboritan Esperanto-tekston, kompreni aŭditan prelegon aŭ fluan parolon, normal-taktan.

b) Oni devas atingi tian gradon da leksikaj, fonetikaj kaj gramatikaj konoj, ke la studento, je la fino de la kurso sen signifaj gramatikaj eraroj kapablu konversacii, regu bonan kompil-kapablon kaj scipovu mez-malfacilan tekston traduki el- kaj en gepatran lingvon per minimuma uzo de la vortaroj.

c) La studento kapablu firme uzi la dulingvajn vortarojn de Esperanto, la Plenan Vortaron kaj la ceterajn specialajn vortarojn.

**La materialo de la instruado**

1. Leksiko

La studento regu je la fino de la kurso ĉirkaŭ 3—4000 leksikajn elementojn produktive kaj la duoblon de tiu kvanto — receptive. La leksiko devas enteni precipe la vivan materialon de la temaro de ĉiutaga vivo sed same ĝi devas enteni ankaŭ la plej gravajn leksikajn elementojn de la kultura, ideologia kaj scienca lingvo. Tiucele estas ellaborendaj krom la lernolibraj tekstoj facilaj beletristikaj fragmentoj kaj poemoj, popularsciencaj kaj ĵurnalistikaj tekstoj.

2. Gramatiko

a) La bazoj de Esperanto-gramatiko (vidu la studobjekton „Enkonduko en Esperantajn studojn") estas pluevoluigendaj, firmigendaj kaj kompletigendaj.

b) Nova gramatika materialo: la bazaj konoj pri la sintakso de Esperanto laŭ la suba temaro:

La frazo. La fraztipoj. La simpla frazo. Subjekto, predikato, objekto, epiteto, adjekto. La kompleksa frazo: kunordigitaj kaj subordigitaj rilatoj. La tipoj de subordigitaj frazoj.

**La studobjekto estas instruenda:** Esperanto I. dum la 5-a, Esperanto II. dum la 6-a semestroj po 4 studhoroj ĉiusemajne.

**Ekzamenoj:** Kolokvioj post la 5-a, respektive 6-a semestroj.

## SISTEMA GRAMATIKO DE ESPERANTO

**Enkonduko:** la proprecoj de formaligita lingvo kaj ĝiaj bazaj diferencoj kompare al naturaj lingvoj. La bazaj karakteriziloj de Esperanto.

La unua varianto de la Internacia lingvo, la elformado de la fina formo; la 16 reguloj.

**Fonetiko:** La fonetika segmentado de la parolfluo. La artikulaciaj parametroj de Esperanto-sonoj. La signifo de artikulacia bazo rilate al la sonsistemo de Internacia Lingvo.

---

* Nur receptive

La Esperanto vokalismo: klasifiko kaj formado de vokaloj. Paralelo inter la hungara kaj Esperanto vokalsistemo.

La konsonantoj de Esperanto: klasifiko kaj formado de vokaloj. La hungara kaj Esperanto vokalismo (paralelo).

Eksperimenta fonetiko: la akustikaj parametroj de Esperanto-sonoj kaj ilia mezurado.

**Fonemiko:** la fonemosistemo de Esperanto. La son-distordoj en la fonemoj de Esperanto sur diversaj artikulaciaj bazoj.

La diftongoj en Esperanto.

La silabo. Tipaj silabmodeloj kaj sonrilatoj surbaze de statistikaj indikoj. La silabstrukturoj de Esperanto-vortelementoj.

La akcento. La karakteriziloj de Esperanto-vortakcento. La influo de elizio. La kvanta kaj kvalita ŝanĝiĝo de sonoj en akcenta situacio.

La intonacio — la elformiĝintaj intonaciaj strukturoj en Esperanto.

Ortoepio: la elformiĝinta normativo de la „bela prononco". La tipaj eraroj de hungaroj kaj la metodo de ilia evito.

**La grafiko de Esperanto:** grafemoj, literoj, supersignoj, interpunkcio. Fonemikeco kaj fonetikeco de Esperanto-grafiko. Ortografio: la uzo de interpunkciaj signoj. Majusklominusklo. Transliterigo kaj transskribo.

**Leksiko:** la inventaro de Esperanto-vortelementoj. Ilia valoro.

La origino de Esperanto-vortelementoj: la etimoj. La proporcio de la opaj elementoj laŭ ilia origino.

La interkombino de elementoj: la libereco de la kombino kaj ĝiaj limoj. La principo de neceso kaj sufiĉo / de Saussure /. La strukturo de Esperanto leksemoj. Generatoroj kaj generativaj modeloj. La semantika kaj morfologia valoroj de leksemoj: la principo de vortefiko / Kalocsay /. Vortigaj operacioj: finaĵŝanĝo, derivado, kunmeto. Pseŭdoafiksoj kaj amorfaj elementoj. La statistiko de vortelementoj: ilia frekvencio kaj kombinativa valento.

**Morfologio / formologio / :**

La formologiaj kategorioj en Esperanto. La parolpartoj / vortspecoj /.

La substantivo: komunaj-propraj; nombro; genro; deklinacio.

La adjektivo: ĝia formado kaj ĝiaj specoj. Deklinacio kaj komparado. Adjektivoj substantive uzataj.

La artikolo. Opozicio: difiniteco-nedifiniteco.

La pronomoj: klasifiko laŭforme kaj laŭfunkcie. Originalaj, derivitaj kaj tabel-pronomoj. Persona, senpersona, refleksiva pronomoj. La poseda pronomo. Demandaj, rilataj kaj montraj pronomoj. Ĝeneraligaj, neaj pronomoj. La emfaza kaj reciproka pronomoj.

La numeralo: baza, orda, multiplika, frakciiga, kolektiviga kaj divida numeraloj. Matematikaj operacioj kaj numeralaj sintagmoj.

La adverbo: klasifiko laŭforme kaj laŭfunkcie. Originalaj, — AU — adverboj, tabeladverboj, — E — adverboj. La gradigo de adverboj.

La verbo: voĉoj, modaloj, modoj. Simplaj kaj kompleksaj verboformoj. Verbonomoj: infinitivo, participoj. Aktivaj kaj pasivaj strukturoj.

La prepozicioj: simplaj kaj kunmetitaj.

La partikuloj: subjunkcioj, konjunkcioj.

La interjekcioj kaj onomatopeoj.

**Sintagmatiko**

La tipoj de vortrilatoj en Esperanto. La sistemo de sintagmoj.

La senperaj komponentoj. Transformaciaj modeloj.

**Sintakso:** La fraztipoj laŭ konstruo kaj paroltono. Tipaj frazmodeloj. Elipsaj frazoj. Frazelementoj. La subjekto. La predikato: simpla kaj kompleksa. La kopulo kaj la predikativo. La objekto: rekta kaj nerekta; infinitiva objekto. La adjekto: ĝia modelo kaj specoj. Epiteto. La kompleksa frazo. La suborditaj prepozicioj kaj iliaj specoj. La vortordo.

**La studobjekto** estas instruata en formo de prelego dum la 7 kaj 8-a semestroj.

**Ekzameno:** Kolokvioj post la 7-a kaj 8-a semestroj. Rigora ekzameno post la 8-a semestro / skriba kaj parola / .

## ESPERANTO LITERATURO

**Enkonduko:** la karaktero de Esperanto-literaturo. Originala kaj tradukita verkaro. Lingvistikaj kaj poetikaj konceptoj. La influo de la literaturo sur al lingvoevoluon. La teritoria kaj tempa divido de la literaturaj periodoj. La karakteristikaj stiltendencoj de opaj periodoj.

### La unua periodo

Literatura agado de Zamenhof. Originalaj verkoj: poemoj. Proverbaro. Kongresaj paroladoj. La Fundamenta Krestomatio: Grabowski, Belmont, Devjatnin, Kofman, Dambrauskas, Kabe. La slava skolo: primitiva romanticismo. La „lingvistika" tendenco de franca skolo: Vallienne, Bourlet, Cart, Boirac, R. de Saussure. La unuaj poetoj: Privat, Hankel, Schulhof, Kozlowski, Kriss. La apreco de la unua periodo, precipe la literaturaj konceptoj de Grabowski kaj Kabe.

### La dua periodo

La „Budapesta skolo" kaj la rondo de „Literatura Mondo": Kalocsay kaj Baghy. La naskiĝo de moderna Esperanto-literaturo. „Dekdu poetoj" kaj „Naŭ poetoj". Szilágyi, Bodó, Tárkony. La konservativa kaj progresiva tendencoj. La neologisma diskuto. La teorio de Esperanto literaturo: la „Parnasa Gvidlibro". La naciaj „skoloj": estonoj: Adamson kaj H. Dresen, britoj: Buttler, Newell, Sturmer, Luyken, katalunoj: J. Grau Casas, A. D. i Mas. La soveta skolo — socialisma realismo kaj partieco: Varankin, Mihalski, Hohlov, Erosenko. La proletaj verkistoj: Lanti kaj Emba. La nordanoj: Bulthuis, Nylen, M. Carlsson, S. Engholm — la realisma romano. La satira kaj fantastika prozo: R. Schwarz kaj Jean Forge. La antologioj: kataluna / 1925 /, bulgara / 1925 /, belga / 1928 /, estona / 1932 /, hungara / 1933 /, ĉeĥoslovaka / 1933 /, sveda / 1934 /. La plej signifaj tradukaĵoj de la periodo. La hungaraj klasikaj kaj siatempaj verkoj esperantlingve.

### La tria periodo

La influo de la dua mondmilito: pacifismo kaj unversalismo. La skota skolo: W. Auld, R. Rossetti, J. S. Dinwoodie, J. I. Francis / „Kvaropo" / . „Metafizika" tendenco. La diasporo de moderna literaturo: Boulton, Szatmári, Rosbach, Mattos, Urbanova, E. de Kock, Ragnarsson, Nisimura Masao: formorompo, liberaj versoj. La popularscienca literaturo: T. Sekelj, P. Neergaard. La ese-literaturo: Waringhien, Regulo-Perez, Brandon Clark. Oratorarto: Lapenna. La plej gravaj tradukaĵoj el la monda kaj hungara literaturo. La beletraj ĵurnaloj kaj revuoj.

**La studobjekton** oni instruas dum prelegoj en la 7-a kaj 8-a semestroj kaj seminarioj dum la samaj semestroj po du, respektive 1 studhoro semajne.

**Ekzameno:** kolokvio post la 7-a semestro, rigora ekzameno / skriba kaj parola post la 8-a semestro.

## DEVIGAJ LEGAĴOJ

Originala literaturo

**Unua periodo**

Zamenhof, L. L.: Orignalaj poemoj, Esperanta Proverbaro, Kongresaj Paroladoj
Fundamenta Krestomatio

Grabowski: Tagiĝo, Reveno de l'filo, Sur unu kordo
Privat, E.: Tra l'silento, Ginevra, Historio de Esperanto
Vallienne, H.: Kastelo de Prelongo

**Dua periodo**

Kalocsay, K.: Mondo kaj Koro, Streĉita Kordo, Rimportretoj
Baghy, J.: Viktimoj, Sur Sanga Tero, Songe sub Pomarbo
Baghy/Kalocsay: Arĝenta Duopo, Ora Duopo
Tárkony, L.: De Paĝo al Paĝo, Soifo
Kalocsay/Waringhien: Parnasa Gvidlibro
Szilágyi, F.: Mistero Minora
Adamson, H.: Vesperkanto
Schwarz R.: Kiel Akvo de l'Rivero
Luyken, H. A.: Pro Istar
Mihalski, E.: Fajro Kuracas
Hohlov, N.: La Tajdo
Engholm, S.: Homoj sur la Tero
Baranyai, E.: Ekzilo kaj Azilo

**Tria periodo**

Auld, W.: Infana Raso
Kvaropo / Stafeto, 1952 /
Rossetti, R.: Pinta Krajono
Boulton, M.: Eroj, Virino ĉe Landlimo
Szathmári, S.: Vojaĝo al Kazohinio, Maŝinmondo
Waringhien, G.: Lingvo kaj Vivo, Eseoj
Sekelj, T.: Tempesto super Akonkagua
Mattes, G.: Ivan VI
Urbanova, E.: Nur Tri Kolorojn
de Kock, E.: Ombroj de la kvara Dimensio
Nisimura, M.: Edelvejso
Ragnarsson, B.: Ŝtupoj sen Nomo

Tradukaĵoj

Shakespeare/Zamenhof: Hamleto
Mickiewicz/Grabowski: Sinjoro Tadeo
Prus/Kabe: La Faraono
Ezopa saĝo / Kalocsay /
Madách/Kalocsay: La Tragedio de l'Homo
Shakespeare/Rossetti: Otelo
Taglibro de Anne Frank / Degenkamp /
Ibsen/Haugen: Peer Gynt
Jelušiĉ/Rotkviĉ: Cezaro
Puskin/Nekrasov: Eugeno Onegin
Benavente/Inglada: Hispanaj Dramoj
Tagore/Lakshmiswar: Malsata Ŝtono
Kalevala / J. E. Leppäkoski /

## LA HISTORIO DE INTERNACIAJ HELPLINGVOJ

**Enkonduko**

La problemo de multlingveco kaj ĝia klarigo en la antikvaj mitologioj. La teorioj pri la origino de la lingvoj. La klasigo de lingvoj. La lingva kaoso kiel internaci-socia problemo. La unuaj perantaj lingvoj: la interlingvoj de la antikva diplomatio kaj komerco. La latino, kiel la interlingvo de la mezepoko. La koloniismo kaj la kreolaj lingvoj. Lingvomiksiĝo kaj miksitaj lingvoj.

La sciencistoj de la XVII—XVIII-a jc. Pri la ebleco de artefarita lingvo kaj iliaj lingvoplanoj: Descartes, Komensky, Leibniz, Newton. La problemo de interkomunika lingvo de la antikveco ĝis niaj tagoj.

**La precibernetikaj lingvaj modeloj**

Lingvaj kaj ne-lingvaj signo-sistemoj. La elformigo de skribsistemoj. La pazigrafioj.

La tipologio de artefaritaj lingvoj: aprioraj kaj aposterioraj lingvo-planoj. La unua internacia lingvo: la Volapüko. La Volapüka Akademio kaj la reformoj. La postvolapükaj lingvoj: Idiom Neŭtral. Pruvoj revivigi mortintajn lingvojn. Minimum- / basic- / -lingvoj kaj kompromisaj lingvoj. La zonala teorio kaj la zono-lingvoj: interromana, inter-germana, inter-slava, inter-skandinava lingvoj. Peano: Latino sine flexione, Jespersen: Novial, von Wahl: Occidental, Goode: Interlingva.

**Esperanto**

Zamenhof kaj lia lingvoplano: Lingvo Internacia. La unua lernolibro. La ekfunkciiĝo de la lingvo kaj ĝia disvastiĝo: presaĵoj, literaturo. La unuaj organizaĵoj. Lingvaj diskutoj: reformprojektoj, la delegitaro, IDO / Couturat, de Beaufront /. Esperanto dum la Unua Mondmilito kaj post ĝi. Sciencaj, kulturaj, fakaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

La Akademio. La Universalaj Kongresoj kaj Internaciaj Someraj Universitatoj. Esperanto en la Societo de Nacioj kaj UNESKO.

Esperanto post la II-a Mondmilito. La nuna stato de la Movado.

La laborista movado kaj SAT.

La Esperanto-Movado en Hungario: G. Bálint kaj Giesswein. La neŭtrala kaj laborista movadoj. Esperanto dum la proleta diktaturo kaj en la nelegala laborista movada / K. Hámán, S. Fürst, Gy. Kulich, Gy. Kilián, I. Kossa /.

**La studobjekton** oni instruas en la 9-a kaj 10-a semestroj po 1 prelego semajne kaj po 1 speciala seminario semajne.

**Ekzameno:** El speciala seminario: ekzerca klasifikaĵo, el Interlingvistiko ŝtatekzameno post absolvo de la 10-a semestro.

## LA INSTRUADO DE ESPERANTO-LINGVO KAJ LITERATURO

La historio de la lerneja instruado de Esperanto. La loko de Esperanto en la sistemo de lernejaj studobjektoj; ĝiaj pedagogiaj kaj didaktikaj valoroj. Edukaj celadoj efektivigeblaj dum ĝia instruado. Ĝia transfera rolo en la sistemo de fremd-lingva instruado.

La faktoroj, determinantaj la instrumetoden de Esperanto.

La planado de la instrumaterialo: metodologia tipologio, la „minimumoj", produktiva, reproduktiva kaj receptiva materialo. Metodologio de lernolibro.

La leksiko de Esperanto kaj la metodo de ĝia instruado. La Esperantogramatiko kaj ĝia instruado. Fonetiko, ortografio kaj intonacio. La elformado de skribkapablo. Legotekniko; analitika kaj sintetika legadoj; La legado, kiel informacia fonto. La evoluigo de parolkapablo: la frazocentra kaj vivproksimeca principoj de la instruado.

La ĝisnunaj instrumetodaj konceptoj. La Ĉseh-metodo. La moderna kompleksa-aktiva/ KA-/metodo. La eblecoj de programigo en la instruado de Esperanto, la instrumaŝinoj.

La planado kaj la antaŭpreparo de instru-eduka laboro. La demonstrado: teknikaj instruhelpiloj kaj tradiciaj demonstriloj. La antaŭpreparo de la studhoro, ĝia organizado kaj gvidado. La studhor-tipoj. La prezentado kaj ekzercado de nova materialo. La parola kaj skriba kontrolo kaj pritakso. La krominstruhora laboro: rondetoj, korespondado, renkontiĝoj. **La studmaterialon** la studentoj alproprigas dum la prelegoj en la 8-a kaj 9-a semestroj, dum la ekzercaj horoj en la 10-a semestro kaj dum iliaj lernejaj instruadekzercoj: 20 horojn rigardatajn kaj 12 devige instruatajn.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de la
Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Jarkolekto 1, n-ro 1
Aperas trifoje pojare

Abonprezo 6,— GM, unuopa kajero 3,— GM

Redaktoro: Helmut Sonnabend, rektoro
Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen, Germanujo
Eldonejo: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2, Germanujo
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56
Bankkontoj: Stadtsparkasse Nürnberg 90 157
Bayerische Vereinsbank Nürnberg 5 606 489
Aŭstra bankkonto: Österreichische Länderbank Bregenz 8 891 611
Svisa bankkonto: Schweizerische Volksbank St. Gallen 629 240
La abonprezon oni pagu al la eldonejo

---

Tarifo por anoncoj:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | paĝo | 250,— GM | 1/2 | paĝo | 125,— GM |
| 1/4 | paĝo | 80,— GM | 1/8 | paĝo | 40,— GM |

Anoncetoj —,25 GM po vorto

Presejo: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 85 Nürnberg, Karl-Bröger-Straße 9.

Elektitaj Esperanto-libroj

FUNDAMENTO DE ESPERANTO de L. L. Zamenhof
Naŭa eldono kun enkondukaj notoj kaj lingvaj rimarkoj
de d-ro A. Albault; 355 p., 15,5x21,5 cm — bind. 14,— GM
broŝ. 10,50 GM

FUNDAMENTA KRESTOMATIO de la lingvo Esperanto
de D-ro L. L. Zamenhof; 446 p., 13,5x20 cm — bind. 13,— GM

LINGVAJ RESPONDOJ, konsiloj kaj opinioj pri
Esperanto, de D-ro L. L. Zamenhof
130 p., 13x20 cm — bind. 8,50 GM
broŝ. 6,50 GM

ORIGINALA VERKARO de L. L. Zamenhof
Antaŭparoloj, gazetartikoloj, traktaĵoj,
paroladoj, leteroj, poemoj, kolektitaj kaj
ordigitaj de D-ro Joh. Dietterle 604 p., 14,5x22 cm — bind. 16,80 GM

PLENA VORTARO DE ESPERANTO kun suplemento,
verkita de prof. E. Grosjean-Maupin,
A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, G
Waringhien, 7a eldono, 511+63 p., 12x17 cm — bind. 16,— GM

PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (PIV)
Formato 15x20 cm, 1298+XXXVII paĝoj — bind. 101,90 GM

LA NOBLA KORANO, dua eldono
Formato 15,5x21,5 cm, 654 paĝoj, — lukse bind. 42,50 GM

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ de Ivo Lapenna
Formato 15x21 cm, 152 paĝoj, — broŝ. 12,— GM

ZAMENHOF, AUTORO DE ESPERANTO
de marjorie Boulton, kun fotoj
265 p., 15,5x22 cm — bind. 15,20 GM
broŝ. 12,— GM

**unesteno** Universala Esperanta Stenografio
de J. J. Sturzenegger kaj H. Matzinger
285 p., 15,5x21,5 cm — bind. 19,60 GM

ESPERANTO 1, lernolibro de Dr. I. Szerdahelyi
212 p., 17x24 cm — bind. 6,60 GM

ESPERANTO A NEW APPROACH de William Auld
Dua eldono, 100 p. 13x19 cm — broŝ. 6,— GM

ESPERANTO PROGRAMITA de Hermann Behrmann
Germana eldono, 4 kajeroj kaj 4 diskoj — 20,— GM

Mendu ĉe **Ludwig Pickel,** libroservo
Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2, Germanujo
Pĉk Nürnberg 819 56